La libreto estas por libera disdonado.

# PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

## Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (kp. *1 Kor* 15, 51-58)

**18.-25. 01.2012.**

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:

- Antonio De Salvo, Guidonia RM, Italio
- Bernard Schwaiger, Erfurt, Germanio
- Bogusław Sobol, Milanówek, Pollando
- Daniel Chevalier, Ecquevilly, Francio
- Doris Legat, Dornbirn, Aŭstrio
- Giovanni Daminelli, Sesto S. Giovanni, Italio
- Karl Reinisch kaj la E-grupo en Graz, Aŭstrio
- Louis Jeuland, Le-Mans, Francio
- Luz Vauquez, Reus, Hispanio
- Marija Belošević, Zagreb, Kroatio
- Mike Leon, Lower Hutt, Novzelando
- Pavol Petrik, Pečovská Nová Ves, Slovakio

Reviziis:

- Antonio De Salvo

Kompilis kaj grafike aranĝis:

- Marija Belošević

La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭ enigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono "Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)

IKUE, www.ikue.org

Zagrebo/Romo, januaro 2012



junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)

* 2004 La Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita

* 2008 en la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj

komune preĝi en la sama jarsezono

* 1958 La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj.

* Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“(Joh 17, 21).

* 1964 La *„Dekreto pri ekumenismo“* de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por la unueco de la kristanoj

* 1966 La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por unueco de kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno

*1968 la unuan fojon la preĝo por unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de unueco de kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj)

*1975 La preĝo por unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio

*1988 La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando

*1994 La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira



Estimataj,

En la manoj vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de dekduopo da bonvolaj personoj, kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montris propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“.

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?
Mi deziras memorigi vin, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, surbaze de unu el la oktago baziĝis ankaŭ la Ekumena diservo dum la UK en Bjalistoko.
Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je E-lingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj....“)
- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekumenan preĝkunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile, jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo

Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.
Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuraĝiga, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

Paco kaj bono!

Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE

*KELKAJ GRAVAJ DATOJ EN LA HISTORIO*
*DE LA SEMAJNO DE PREĜADO*
*POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ*

* ĉ. 1740 En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj

* 1820 Sac. James Haldane Stewart publikigis « Sugestojn por la Ĝenerala Unio de Kristanoj cele al la elfluo de la Spirito » ('Hints for the outpouring of the Spirit').

* 1840 Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas 'Unuiĝon de preĝado por Unueco'.

* 1867 La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj.

* 1894 *Papo Leono* la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por unueco kadre de festo de Pentekosto.

* 1908 Unua okazigo de la «Preĝosemajno por unueco de Eklezio» en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson.

* 1926 La Movado «Fido kaj Konstitucio» komencas publikigon de «Sugestoj por preĝosemajnoj por unueco de kristanoj» okaze de Pentekosto

* 1935 En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por unueco de kristanoj bazita sur la komuna preĝo por «unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras»

* 1941 Komisiono «Fido kaj Konstitucio» translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu

En la jaro 2009 estis eldonita libro „Survoje al Kristo. Kristanaj eklezioj parolas pri si mem“. En tiu libro prezentiĝis la eklezioj unuigitaj en la Pola ekumena Konsilantaro, samkiel la Romkatolika eklezio – kaj tio okazis la unuan fojon en la pola postmilita historio – en unu publikaĵo.

Menciindas la faktoj ke papoj Johano Paŭlo la 2-a kaj Benedikto la 16-a okaze de pilgrimoj al Pollando renkontiĝis kun pastraro kaj membroj de eklezioj unuiĝintaj al la Pola ekumena Konsilantaro.

Grava okazaĵo estis la eldono, kunordigita de Biblia Societo, de la ekumena traduko de la Nova Testamento en jaro 2001 kaj la Libro de Psalmoj. En la tradukado estis engaĝitaj 11 Eklezioj. Kaj nun daŭras laboroj ĉe la tradukado de Malnova Testamento.

En la Pola ekumena Konsilantaro nuntempe membras: Pola ortodoksa eklezio, Pola katolika eklezio, Malnovkatolika mariavita eklezio, Evangelia luterana eklezio, Evangelia reformita eklezio, Evangelia metodista eklezio kaj Pola baptista unio. La Biblia societo en Pollando kaj Socia unuiĝo de polaj katolikoj estas alligitaj membroj.

La Ekumena Redakta Komitato.

- Edward Puślecki, superulo de Eklezio Evangelia Metodista en Pollando, Varsovio
- episkopo Krzysztof Nitkiewicz, Romkatolika Eklezio, episkopo de Sandomierz
- s-ino Monika Waluś, Romkatolika Eklezio, Józefów
- s-ino Kalina Wojciechowska, Evangelia Aŭgsburga Eklezio en Pollando, Varsovio
- pastro Andrzej Gontarek, Pola katolika Eklezio, Lublin
- pastoro Ireneusz Lukas, Evangelia Aŭgsburga Eklezio, Varsovio
- pastro Henryk Paprocki, Pola memstara ortodoksa Eklezio, Varsovio
- pastro Sławomir Pawłowski, S.A.C., Romkatolika Eklezio, Lublin



## Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (kp. *1 Kor* 15, 51-58)

Jen mi sciigas al vi misteron: Ni ne ĉiuj dormos, sed ni ĉiuj ŝanĝiĝos, en momento, en okula ekmovo, ĉe la lasta trumpetsono: ĉar la trumpeto sonos, kaj la mortintoj releviĝos senputraj, kaj ni ŝanĝiĝos. Ĉar estas necese, ke ĉi tiu putrema surmetu senputrecon, kaj ke ĉi tiu mortema surmetu senmortecon. Sed kiam ĉi tiu putrema surmetos senputrecon, kaj ĉi tiu mortema surmetos senmortecon, tiam plenumiĝos la skribita diro:

*La morto forglutiĝis en venko.*
*Ho morto, kie estas via venko?*
*Ho morto, kie estas via pikilo?*

La pikilo de la morto estas la peko; kaj la forto de la peko estas la leĝo; sed danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per nia Sinjoro Jesuo Kristo. Tial, miaj amataj fratoj, estu firmaj, nemoveblaj, ĉiam abundaj en la laboro de la Sinjoro, sciante, ke via penado ne estas vanta en la Sinjoro.

## TEOLOGIA-PAŜTISTA ENKONDUKO
## Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto
## (kp. *1 Kor* 15, 51-58)

La materialon por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj 2012 preparis laborgrupo farita de reprezentantoj de la katolika Eklezio, de la ortodoksa Eklezio, de la malnov-katolika Eklezio kaj de la protestantaj Eklezioj ĉeestantaj en Pollando.

Fine de ampleksa konsultado, en kiu partoprenis reprezentantoj de diversaj ekumenaj rondoj en Pollando, oni decidis elstarigi temon, kiu rilatas la transformantan povon de la fido al Kristo, precipe rilate nian preĝon por la videbla unueco de la Eklezio, korpo de Kristo. La elekto baziĝis sur la vortoj de la apostolo Paŭlo al la eklezio de Korinto, per kiuj li atentigas pri la portempa karaktero de la nuna vivo (kun ĝiaj ŝajnaj "venkoj" kaj "malvenkoj"), komparante ĝin kun tio, kion ni ricevas de la venko de Kristo per la paska mistero.

Kiel motivi la elekton de ĉi tiu temo? La historio de Pollando montras serion da malvenkoj kaj venkoj. Oni povas memorigi la multajn fojojn, en kiu Pollando estis invadita de malamikoj, la dispartigon, la subpremon fare de eksterlandaj povoj kaj de malamikaj reĝimoj. La daŭra batalo por superi ĉian malliberecon kaj la deziro de libereco karakterizas la polan historion, kiu alportis signifajn ŝanĝojn en la nacian vivon. Tamen, kiam estas venko, estas ankaŭ venkitoj, kiuj ne partoprenas la ĝojon kaj la triumfon de la venkintoj.

Tia vidpunkto, aparta de la pola historio, kondukis la Lokan Ekumenan Grupon, respondecan pri la verkado de la ĉijara teksto, al pli profunda prikonsidero pri la signifo de "venki" kaj "malvenki", precipe, kiam la lingvaĵo de la "venko" estas tiel ofte komprenata per triumfaj vortoj. Kontraŭe, Kristo, montris al ni vojon tute malsaman! En 2012 la Monda futbala ĉampionludo okazos en Pollando kaj en Ukrainio. Tio estus neniamaniere ebla en la pasintaj jaroj. Por multaj tio estas signo de alia "venko", ĉar cento da milionoj da pasiuloj atendos senpacience novaĵojn pri la venkintaj teamoj inter tiuj konkurantaj en tiu parto de Eŭropo. Ĉi tiu simpla ekzemplo pensigas al la disreviĝo de la nevenkintoj - ne nur en la sporto, sed ankaŭ en la vivo ĉe iliaj komunumoj: en la sporto, sed ankaŭ en la vivo ĉe iliaj komunumoj: kiu



Pollando, kies prezidanto ekestis pastoro Konstanty Najder, ĝenerala superulo de la Metodista eklezio.

La Pola ekumena Konsilio oficiale fondiĝis en Varsovio la 15-an de novembro 1946. La fondkunsidon ĉeestis reprezentantoj de dekdu konfesioj. Prezidanto fariĝis pastoro Zygmunt Michelis (1890-1977) el la Evangelia Aŭgsburga Eklezio.

Ĝis la fino de la sesdekaj jaroj interrilatoj de Pola Ekumena Konsilantaro kun Romkatolika Eklezio havis neoficialan karakteron. Malgraŭ tio, multaj katolikoj kaj pastroj kaj laikoj ĉeestis la diservojn okaze de la Preĝosemajnoj por la unueco de kristanoj organizitaj de la membroj de Pola Ekumena Konsilantaro.

La unua ekumena diservo en katolika preĝejo okazis antaŭ la 2-a Vatikana Koncilio kun la partopreno de reprezentantoj de aliaj kristanaj konfesioj en la preĝejo de la Sankta Marcin en Varsovio la 10 an de januaro 1962. Ĉi jare estas 50-a datreveno de tiu ĉi okazaĵo.

Miksita komisiono de la Pola ekumena Konsilantaro kaj la Episkopara konsilio por ekumenismo fondiĝis en la jaro 1974 kaj ebligis oficialajn kontaktojn inter la Romkatolika eklezio kaj Pola ekumena Konsilantaro. En la jaro 1977 la Miksa Komisiono fondis Subkomisionon por dialogo, kies tasko estis antaŭenigi teologiajn demandojn.

Dudek jarojn poste (1997) surbaze de la ĝistiama kunlaboro estis fondita Komisiono por dialogo de la Pola episkopa konferenco kaj la Pola ekumena Konsilantaro. Unu inter la gravaj rezultoj de tiu kunlaboro okazis en la jaro 2000, kiam la estroj de ses eklezioj - membroj de la Pola ekumena Konsilantaro kaj la Romkatolika eklezio - subskribis dokumenton „Bapto-sakramento signo de unueco", en kiu subskribinte ili deklaris reciprokan agnoskon de bapto.

De la jaro 2000 la Komisiono por dialogo pristudas la temon de la miksitaj geedziĝoj, surbaze de kiu en la jaro 2009 estis prezentita ekumena skizo rilate tiujn geedziĝojn.

Grava okazaĵo kiun kunordigis la Biblia societo en Pollando estis eldono de la ekumena traduko de la Nova testamento kaj psalmoj en la jaro 2001. Al la tradukado kontribuis dekunu eklezioj. Momente oni prilaboras la ekumenan tradukon de la Malnova testamento.

En Pollando aktivas ankaŭ aliaj protestantaj eklezioj, ekz. Pentekostana eklezio, Adventista eklezio de la Sepa Tago, Komunumo de la kristanaj eklezioj kaj Eklezio de evangeliaj kristanoj. Iuj el ili estas unuiĝintaj kun la Evangelia Interligo. En Pollando ekzistas ankau aliaj religiaj komunumoj, kiel Unio de judaj religiaj komunumoj, Karaima religia Interligo kaj Muzulmana religia Interligo.

**Ekumena situacio**

Dum pasintaj jarcentoj Pollando estis plej diversa kiam temas pri konfesioj, fierante pri longa tradicio de libereco, religia toleremo kaj ekumena kunlaboro. La nuntempa religia bildo estas sekvo de multaj historiaj okazaĵoj, kaj precipe de la 2-a Mondmilito ligita kun la ŝanĝo de limoj kaj amasa migrado de popolo.

La historia tradicio de ekumenismo en Pollando datas jam de 16-a jarcento. En jaro 1570 granda okazaĵo estis la Sandomiera Kontrakto inter la luteranoj, kalvinanoj kaj ĉeĥaj fratoj. En jaro 1777 inter la luteranoj kaj la kalvinanoj oni kontraktis Sielecan Union kaj en 1828-1849 estis proksima kunlaboro de luteranoj kaj reformitaj, kiuj posedis komunan Konsilion.

La unua interkonfesia organizaĵo en Pollando estis kreita en jaro 1923, tio estis Landa sekcio de la Monda Asocio por disvastigo de amikeco inter nacioj kiu ekestis pere de eklezioj. Ĉe la komenco ses eklezioj (luterana, reformitaj kaj de la grek-katolika tradicio) apartenis al la Pola sekcio, tiel solvante inter si diversajn demandojn kaj komune agis. Kiam en la jaro 1930 ankaŭ la Pola ortodoksa eklezio aliĝis, ekestis la historia ebleco de la kunveno de du disigitaj kristanaj tradicioj – evangelia kaj ortodoksa – en komuna organizaĵo.

Dum la 2-a Mondmilito, fine de la jaro 1942 kreiĝis Provizora Ekumena Konsilantaro. Oni prilaboris la ekumenan Konfeson de la Kredo de Polaj Kristanoj pri la dogmaj formuloj agnoskantaj la komunan bonon.

En la jaro 1945 la reprezentantoj de kvin protestantaj eklezioj – evangelia luterana, evangelia reformita, evangelia metodista, baptista unio kaj de evangeliaj kristanoj – kunfondis komunan oficialan mision konatan kiel Konsilantaro de protestantaj eklezioj en la Respubliko



eldiros bonvolajn vortojn por la venkitoj, por tiuj, kiuj daŭre suferas malvenkojn ĉar, pro diversaj kialoj kaj cirkonstancoj, ili estas ĉiam senigitaj je sia venko? La konkurado estas ĉiama karakterizo ne nur de la sporto, sed ankaŭ de la politika, ekonomia, kultura, kaj eĉ eklezia vivoj.

Kiam la disĉiploj de Jesuo diskutadis pri "kiu estas la plej granda" (*Mar* 9, 34), estis klare ke ili estis tre kuntrenitaj. Sed la reago de Jesuo estis tre simpla: "Se iu volas esti la unua, li devas esti la lasta kaj la servanto de ĉiuj" (*Mar* 9, 35). Ĉi tiuj vortoj parolas pri venko pere de reciproka servado, helpo, kuraĝigo al la sinestimo de la "lastaj", de la forgesitaj, de la ellasitaj. Por ĉiuj kristanoj, la plej bela esprimo de ĉi tiu humila servo estas Jesuo Kristo, lia venko per lia morto kaj lia releviĝo. En lia vivo, en liaj agoj, en liaj instruoj, en lia sufero, morto kaj releviĝo ni volas trovi inspiron hodiaŭ por venka vivo de fido, kiu sin manifestas en la socia zorgado, en la karitata spirito, en la servo kaj fideleco al la evangelio. Kaj, dum li atendis la suferon kaj la morton proksimiĝintajn, Jesuo preĝis por siaj disĉiploj, por ke "ili ĉiuj estu unu; [...] por ke la mondo kredu" (*Joh* 17, 21). Ĉi tiu "venko" estas ebla nur pere de spirita transformado, de konvertiĝo; tia konscio motivis la elekton de la vortoj de la apostolo Paŭlo al la nacioj, kiel temon de la ĉijara Preĝosemajno. La atingenda celo estas venko, kiu kunigas ĉiuj kristanoj en la servo al Dio kaj al proksimulo.

Dum ni preĝas kaj zorgas pri la plena kaj videbla unueco de la Eklezio, ni - kaj niaj apartaj tradicioj - estos ŝanĝataj, transformataj kaj konformigataj al la bildo de Kristo. La unueco, por kiu ni preĝas, povas postuli renoviĝon de la vivmanieroj de la Eklezio al ni kutimaj. Tia estas emociiga vizio, sed ĝi povus esti ankaŭ timiga. La unueco, pri kiu ni preĝas, ne estas nur "komforta" nocio pri amikeco aŭ kunlaboro: ĝi postulas la volon eviti ĉian konkuradon inter ni. Ni devas malfermiĝi, unuj al la aliaj, oferi kaj ricevi donacojn, unuj de la aliaj, por ja eniri en la novan vivon en Kristo, kiu estas la ununura kaj vera venko.

En la plano de la dia savo estas loko por ĉiuj. Per siaj morto kaj releviĝo, Jesuo ĉirkaŭbrakas ĉiujn, venkintojn kaj venkitojn, "por ke ĉiu, fidanta al li, havu eternan vivon" (*Joh* 3, 15). Ankaŭ ni povas partopreni en lia venko! Ni devas nur kredi al li, kaj ni sukcesos facile venki la malbonon per la bono.

## OK TAGOJ POR PRIKONSIDERI NIAN ŜANĜIĜON EN KRISTO

En ĉi tiu semajno ni estas invitataj pliprofundigi nian fidon pri ĉi tio, ke ni estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo, nia Sinjoro. La bibliaj legaĵoj, la komentoj, la preĝoj kaj la demandoj por la medito estas ĉiuj celantaj esplori, laŭ la malsamaj vidpunktoj, kion, tio signifas por la vivo de la kristanoj kaj por ilia unueco. Ni komencas kontemplante Kriston servantan, kaj nia irado kondukos nin al la fina celebro de la Regno de Kristo, pasante tra lia kruco kaj lia releviĝo.

LA UNUA TAGO: **Ŝanĝitaj per Kristo, la Servanto**
***La Filo de homo venis por servi (kp. Mar 10, 45)***

La unuan tagon de la preĝosemajno Kristo renkontas nin kiel „la Filo de homo, kiu ne venis por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj“ (Mk 10,45). Tial ankaŭ la Eklezio de Jesu-Kristo estas vokata por servi. Kie niaj diversaj donoj estas uzataj por la komuna servo al la homoj, tie nia unueco en Kristo videblas.

LA DUA TAGO: **Ŝanĝitaj per pacienca atendado de la Sinjoro**
***Lasu tion, ĉar estas ĝuste por plenigi la justecon (Mar 3,15)***

Ŝanĝiĝo postulas persiston kaj paciencon. La preĝado por ŝanĝiĝo esprimas niajn kredon kaj konfidon je Dio. Esence estas tiu atendado je la Sinjoro por ĉiuj, kiuj ĉi-semajne preĝas por la videbla unueco de la Eklezio. Ĉiuj ekumenaj aktivecoj postulas tempon, reciprokan atentadon kaj komunan agadon. Al tio ni ĉiuj estas vokataj sub gvido de la Spirito.

LA TRIA TAGO: **Ŝanĝitaj de la suferanta Servanto**
***Kristo suferis por vi ( 1Petr 2,21)***

Ĉi-tage ni pripensas la suferon de Kristo. Sekvante la postesignojn de la suferanta Kristo ni kristanoj estas vokataj al la solidareco kun ĉiuj suferantoj. Ju pli ni alproksimiĝas al la kruco de Kristo, des pli ni alproksimiĝas unu al la alia.

LA KVARA TAGO:
**Ŝanĝitaj de la venko de la Sinjoro kontraŭ la malbono**
***Venku malbonon per bono (Rom 12, 21)***

La venko en Kristo signifas venkon super ĉiuj aferoj kiuj



en la konservado de la poleco kaj la sendependeco, precipe dum la tempo de la okupado (1772-1918) kaj dum la komunista periodo (en la jaroj 1945-1989). La Eklezio estis ankaŭ la azilo por la sindikata movado „Solidareco”, kiu kondukis al demokratio en Pollando kaj Eŭropo. Grandan signifon por la socia kaj politika transformiĝo dum la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento havis la elekto de la pola Papo Johano Paŭlo la Dua, kiu estis konata en la tuta mondo kiel protektanto de respekto por la diversaj religioj, paco inter la popoloj, digno kaj homa libereco.

La dua laŭ la grandeco Eklezio en Pollando estas Pola Ortodoksa Eklezio (ĉirkaŭ 550 mil kredantoj). Ĝiaj komencoj ligiĝas al la misiita agado de sanktaj Cirilo kaj Metodo (9-a j.c.). De la tempo de regado de Kazimiro la Granda (16-a j.c.) la kredantoj de tiu ĉi Eklezio partoprenis en la vivo de la pola ŝtato. De la jaro 1925 la Ortodoksa Eklezio posedas la statuson de aŭtokefala Eklezio.

En la jaro 1596, kiel rezulto de Unio de Breclavo, parto de ortodoksaj pastroj kaj kredantoj agnoskis la papon kiel plej superan estron de la Eklezio kaj akceptis la katolikajn dogmojn, tamen daŭre praktikante la bizancan riton. Tiel naskiĝis la Grekkatolika eklezio, kiu hodiaŭ en Pollando nombras ĉ. 100 mil kredantojn.

Evangelia luterana eklezio (ĉ. 75 mil kredantoj) kaj Evangelia reformita (kalvinana) eklezio (ĉ. 3 500 kredantoj) ekestis dum la periodo de Reformacio en la 16-a j.c. Evangelia metodistista eklezio (ĉ. 5 000 kredantoj) kaj Baptista unio (ĉ. 5 000 kredantoj) en Pollando ekzistas de la 19-a j.c.

Ekzistas ankoraŭ du eklezioj kiuj datas de la fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcentoj kaj ili apartens al Malnovkatolikaj eklezioj: Mariavita eklezio kaj Pola katolika eklezio. Malnovkatolika mariavita eklezio (ĉ. 25 000 kredantoj) disiĝis de la Romkatolika eklezio en la jaro 1906. Pola katolika eklezio ekestis inter la polaj elmigrantoj en Usono sub la gvido de pastro Franciŝek Hodur. Ĝi nombras ĉ. 22 000 kredantojn kaj apartenas al la Utreĥta Unio.

kreis la kondiĉojn por la disvolvo de la instruado kaj kulturo, oni enkondukis ankaŭ la demokratiajn procedurojn. Unu el la plej tragikaj periodoj en la historio de Pollando estis la tempo de la 2-a Mondmilito (1939-1945).

Kiam la 1-an de septembro 1939 jaro la nazia Germanio atakis Pollandon, poloj dum ses semajnoj luktis kontraŭ dominanta milita potenco.

La situacio fariĝis ankoraŭ pli malfacila, kiam la 17-an de septembro 1939 al la orientaj partoj de Pollando enpaŝis la Soveta Ruĝa Armeo. Poloj batalis ankaŭ en Norvegio, Anglio, Italio, Nederlando, Sovetunio, Proksima Oriento kaj en Afriko.
Pereis pli ol ses milionoj da polaj civitanoj. Sur la teritorio de Pollando kreiĝis Konspira Landa Armeo kaj sekretaj ŝtataj strukturoj. En aŭgusto 1944 en Varsovio eksplodis la ribelo, dum kiu pereis 200 mil ribelantoj kaj civiluloj. La ĉefurbo estis detruita je 95% de hitleranoj. Post la milito en jaro 1945 Pollando ektroviĝis en la soveta influo kaj fariĝis socialisma respubliko. Oni delokis la limojn. La orientajn teritoriojn oni redonis al Sovetunio, kaj la okcidentan limon oni delokis ĝis la riveroj Odra kaj Nysa. Ĉeokaze oni translokigis milionojn da homoj. Fine de la 70-aj jaroj rompiĝis la ekonomia situacio de la lando, pligrandiĝis malkontento de la homoj kaj fariĝis granda Movado de sociala rezisto. Kreiĝis la sindikato „Solidareco” sub la gvido de Lech Wałęsa. „Solidareco” havis 10 milojn da membroj. Tiel nomata „peerestrojko” en Sovetunio kaj la granda sindikata movado en Pollando kontribuis al la demokratia transformiĝo en Eŭropo, kaj al Pollando kunportis la suverenecon. En la 1989 jaro okazis la ŝanĝo de politika sistemo kaj komenciĝis parlamenta demokratio. Okazis la unuaj liberaj parlamentaj balotoj, komencis kreiĝi la novaj politikaj partioj kaj organizaĵoj. Pollando en 1999 aliĝis al NATO kaj al la ekonomia interŝanĝo (WTO, OECD).

En 2004 Pollando fariĝis membro de Eŭropa Unio, kio estas la plej grava decido de la pasintaj jaroj.

**Konfesia situacio**

La plej granda Eklezio en Pollando estas la Romkatolika Eklezio (ĉirkau 95% el la homoj). Tiu ĉi Eklezio ludis grandan rolon



damaĝas la kreaĵon de Dio kaj kiuj apartigas unu de la aliaj. Kristo invitas nin partopreni lian novan vivon kaj plenkonfide kaj kun ĝojo je la bono batali kontrau ĉio, kio estas falsa en nia mondo. Se ni restas apartigitaj, ni restos tro malfortaj por kontraŭbatali la malbonon de nia tempo.

LA KVINA TAGO: **Ŝanĝitaj per la paco de la Sinjoro releviĝinta**
***Jesuo staris meze de ili kaj diris al ili: Paco al vi. (Joh 20,19)***

Hodiaŭ ni festas la pacon de la Sinjoro releviĝinta. Li venkis la morton kaj la mondon de la malhelo. Li kunvokas siajn disĉiplojn kiuj estas paralizitaj de timo. Li donas al ni novan rigardon por la eblecoj de kunlaborado en la Dia Regno. La Sinjoro releviĝinta unuigas kaj fortigas ĉiujn kiuj kredas al Li. Paco kaj unueco estas la signoj de la transformanta forto de lia releviĝo.

LA SESA TAGO: **Ŝanĝitaj de la Eterna Boneco de Dio**
***Jen estas la venko, nia fido (kp. 1 Joh 5,4)***

La mistero de Pasko malkaŝas la ĉiaman amon de Dio kaj vokas nin al la kredo. Tiu kredo venkas la timon kaj malfermas niajn korojn al la forto de la Sankta Spirito. La kredo estas amikeco kun Kristo kaj serĉas amikecon kun ĉiuj kredantoj.

LA SEPA TAGO: **Ŝanĝitaj de la Bona Paŝtisto**
***Paŝtu miajn ŝafojn (Joh 21,19)***

La Sinjoro releviĝinta gvidas la Siajn kiel bona paŝtisto gvidas sian ŝafaron. En la sekvado de la Bona Paŝtisto ni estas vokataj fortigi nin reciproke, helpi la malfortulojn kaj la perditojn kaj doni al ili subtenon. Estas nur unu paŝtisto, kaj ni estas Lia popolo.

LA OKA TAGO: **Unuiĝintaj en la Regado de Kristo**
***Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono (Apo 3,21)***

Je tiu lasta tago de la Semajno por la unueco de la kristanoj ni festas la regadon de Kristo. Ĉar Kristo venkis la morton, ni povas rigardi la estontecon kun granda espero. La venko de Kristo venkos ĉion kio detenas nin kundividi lian abundan vivon al ni reciproke. Ni scias ke la unueco inter ni kristanoj antaŭ ĉio estas donaco de Dio. Ĉiam kiam ni, helpataj de Dio, venkas la disiĝon, ni partoprenas en la venko de Kristo.

## EKUMENA CELEBRADO DE LA DIA VORTO

Ni ĉiuj ŝanĝiĝos, per la venko de nia Sinjoro Jesuo Kristo
(1 Kor 15, 51-58)

**Enkonduko al la ekumena celebrado**

La ekumena celebrado de la Preĝosemajno por la unueco de kristanoj 2012 estis redaktita de pola ekumena Grupo, kiu ĉerpis la liturgion el sia sperto de kristanoj en Pollando, kiuj travivis momentojn de ĝojo kaj de kontraŭstaroj. La historio de Pollando estis markita de vico da malvenkoj, venkoj, invadoj, dispartiĝoj kaj subpremoj fare de fremdaj potencoj kaj de malamikaj reĝimoj. La daŭra batalado por superi ĉian kaptitecon kaj la deziro je libero estas karakteriza trajto de la pola historio.

La celebrado proponas kiel temon la pecon de la Leteroj al Korintanoj 15, 51-58 kiu anoncas la transforman povon de la fido je Kristo, aparte en rilato kun nia preĝo por la videbla unueco de la Eklezio, korpo de Kristo.

Ĝuste dum ni preĝas kaj strebas por la plena kaj videbla unueco de la Eklezio, ni - kaj la tradicioj al kiuj ni apartenas - estos do ŝanĝataj, transformataj kaj konformigataj laŭ la bildo de Kristo.

La unueco por kiu ni preĝas povas postuli renovigon de la vivoformoj de la Eklezio kiuj estas al ni familiaraj. Ĉi tiu estas emociiga vido, kiu tamen povus ankaŭ timigi nin. La unueco por kiu ni preĝas estas ne nur iu "komforta" nocio pri amikeco kaj kunlaboro: ĝi postulas la volon eviti ĉian vetkonkurson inter ni. Ni devas nin malfermi unu al la alia, proponi kaj ricevi donacojn unu de la alia, por ke ni povus reale eniri en la novan vivon en Kristo, kiu estas la ununura vera venko.

.

**Skemo de la celebrado**

I. ENKONDUKAJ RITOJ
Laŭ la loka kutimo oni povas havi himnon dum la procesio, sekvatan de malferma preĝo aŭ de pentofara ago.
II. CELEBRADO DE LA DIA VORTO
Estas tri pecoj ĉerpitaj el al Skribo: la Letero al Korintanoj ĉapitro 15 estas esenca al la temo. Ĝi estas sekvata de sermono/ homilio aŭ de



**La historia trajto**

La kristanismo en Pollando havas pli ol 1000 jaran historion. La unuaj kristanaj komunumoj aperis sub la influo de sanktaj Cirilo kaj Metodo. La organizado de la eklezia vivo okazis dum la regado de la unua historia reganto Mieŝko la 1-a el la gento de Piast, kiu unuigis la slavajn gentojn loĝantajn ĉe rivero Vistulo. Oni akceptis la daton de la kreiĝo de pola ŝtato la jaron 966, kiam Mieŝko la 1-a kun siaj regatoj akceptis la bapton. La unua ĉefurbo de la ŝtato estis Gniezno, kie en jaro 1000 okazis kunveno de tri monarĥoj: germana, ĉeĥa kaj pola. Oni establis la unuan ĉefepiskopejon, kiu havis memstaran jurisdikcion.

La unua kronita reĝo de Pollando estis Bolesław Chrobry, kiu signife disvastigis la limojn de la ŝtato kaj apogis la misiistajn agadojn. La 15-an kaj 16-an jarcentojn oni nomis la oraj jarcentoj en la historio de Pollando. Tiu ĉi tempo estis la plej granda politika, ekonomia kaj kultura brileco de Pollando. Tiutempe alvenis ankaŭ al Pollando la ideoj de Reformacio. La instruoj de Martin Lutero trovis adeptojn inter burĝoj, Johano Kalvino kaj Ulrik Zvingli – inter nobelaro (antaŭe kavaliroj). Pollando tiam fariĝis la ŝirmejo por protestantoj kaj judoj. Sur la pola tero de la komenco trovis lokojn judoj, karaimoj, muzulmanoj (polaj tataroj). La 13-a jarcento estis la periodo de kontraŭreformacio, la tempo dum kiu interalie oni senigis la politikajn rajtojn de protestantoj, oni devigis arianojn al emigrado, kio influis por la deteno de disvolviĝo de pola evangeliismo. La ŝtato transdaŭris ĝis la jaro 1795, kiam oni dividis Pollandon inter tri okupintoj: Regno de Prusujo, Rusa Imperio kaj Aŭstrio, okazis tiel nomata dispartigo de Pollando. Dum 123 jaroj Pollando ne ekzistis sur la mapo de Eŭropo. La sendependecon de la dividita ŝtato la poloj penis reakiri dum la naciaj ribeloj, kiel la ribelo de Kościuŝko en jaro 1791, la Ribelo Novembra en jaro 1830, la partopreno en la Printempo de la Popoloj en jaro 1848, Januara Ribelo en jaro 1863 kaj dum la Unua Mondmilito. La liberecon kaj sendependecon Pollando reakiris nur en jaro 1918. La intermilitaj jaroj (1918-1939) estis la jaroj de peno pri la rekonstruo de la ŝtato post la politiko de okupintoj kaj la militaj detruoj. Mallonga periodo de 20 jaroj de sendependeco estis la tempo de rapida evoluo. Pollando feliĉe eliris el la tutmonda ekonomia krizo en la jaroj 1920-1930. Disvolviĝis la industrio, oni enkondukis la universalan klerigon,

# INFORMOJ PRI POLLANDO

# EKUMENA KUNTEKSTO

## Ĝeneralaj informoj

Pollando, oficiale Respubliko Pollando, estas ŝtato en Mezeŭropo, ĉe la Balta maro. Ĝi limas kun Germanio (okcidente), Ĉeĥio kaj Slovakio (sude), Ukrainio kaj Belorusio (oriente), Litovio (nordoriente) kaj Rusio (norde). Ĉe la Balta maro Pollando havas marajn limojn kun Danio kaj Svedio.

Kun la terspaco de 312 700 km2, Pollando estas laŭ grandeco naŭa ŝtato en Eŭropo. Ĝi havas pli ol 38 milionoj da loĝantoj. La ĉefa urbo estas Varsovio.

La poloj konsistigas preskaŭ 97% el la loĝantaro. Ĝis la jaro 1939 triono el la loĝantaro estis etnaj malplimultoj. Ĉirkaŭ ses milionoj da homoj pereis dum la 2-a Mondmilito (kalkulante ankaŭ 3,5 milionojn da Judoj en Holokausto). Hodiaŭ, la etnaj malplimultoj havas etan procentaĵon en la tuta loĝantaro. Plej multnombraj estas ukrainanoj, belorusoj kaj germanoj (ili havas siajn reprezentantojn en la parlamento) kaj ciganoj, litovoj, slovakoj kaj ĉeĥoj.

Poloj parolas la polan lingvon, kiu apartenas al la slava lingvogrupo. Al la etnaj malplimultoj oni leĝe garantias uzon de propra lingvo.

Kiel rezulto de elmigrado pro ekonomiaj kaj politikaj kialoj, kiuj datas de la 19-a j.c., preskaŭ 15 milionoj da poloj vivas ekster la limoj de sia patrolando. Hodiaŭ la plej multenombraj polaj komunumoj estas en Usono, Germanio, Brazilo, Francio kaj Kanado.



aliaj formoj de klarigo de la Skribo. Povas sekvi la kredkonfeso.

III. PREĜOJ POR LA UNUECO KAJ POR ESTI TRANSFORMATAJ EN KRISTO
La kerno de la propetaj preĝoj estas la unueco kaj la transformiĝo en Kristo en la diversaj circkonstancoj. Ĉi tiuj preĝoj estas sekvataj de la pacosigno.

Pacosigno kaj kundivido de oblato ("senfermenta pano")

Estas aparta tradicio en Pollando, kiu konsistas en tio, ke oni kundividas kun la familio antaŭ la vespermanĝo de la antaŭtago de Kristnasko, sed ankaŭ en la bondeziraj renkontiĝoj de la kristnaska periodo, ĉu preĝeje ĉu en la labormedio, subtilan tavolon de senfermenta pano nomata oblato (en la pola opłatek, plurale opłatki). Ĝi estas tradicio tiom kara al la Poloj, en patrolando kaj en eksterlando, ke ĝi estas praktikata de ĉiuj kristanboj ankaŭ alikonfesiaj, kaj eĉ de la nekredantoj.
Al ĉiu persono estas donata oblato, kiun la personoj kundividas, dispecigante parton de la oblato de alia persono kaj manĝante ĝin. Tiamaniere oni reciproke interŝanĝas la bondezirojn. Ĉi tiu interŝanĝo esprimas la unuecon, la amon, kaj la pardonon inter la personoj al kiuj Kristo donacis la savon. Kvankam ĝi ne estas la eŭkaristio, tamen ĝi simbolas la ĉeeston de Kristo, naskiĝinta en la "domo de l' pano" (Betleĥemo) kaj kiu fariĝis, Li mem, la pano de vivo.
Se ne estas je dispono senfermenta pano aŭ oblatoj, oni povas utiligi fermentintan panon. La interŝanĝo de la pacosigno povas esti farata laŭ la loka kutimo.

IV. FINAJ RITOJ
Estas entenata preĝo de sindevigo, kiu baziĝas sur la temoj de ĉiu el la ok tagoj. La celebrado finiĝas per la beno, kiu povas esti disdonata laŭ la loka kutimo.
C = CELEBRANTO
L = LEGANTO
Ĉ = ĈIUJ

## I. ENKONDUKAJ RITOJ

**Enira kanto**
*Dum la kanto aŭ la preludo, la celebrantoj povas eniri procesie.*

**Komenca saluto**

C: La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio kaj la komuneco kun la Sankta Spirito estu kun vi ĉiuj.
**Ĉ: Kaj kun via spirito.**

**Enkonduko**
*Post la saluto aŭ la prezento de la ĉeestantoj, oni povas fari mallongan enkondukon pri la temo. La celebranto povas diri:*

C: Aŭskultu! Mi proklamos al vi Misteron! Ni ne mortos, sed ni ĉiuj ŝanĝiĝos!

**Ĉ: Estu danko al Dio, kiu donas al ni la venkon en nia Sinjoro Jesuo Kristo.**

C: Dio en Kristo estas la Venkanto. La venko postulas streĉon kaj bataladon. Dum ni preĝas kaj strebas por la plena kaj videbla unueco de la Eklezio, ni - kaj la tradicioj al kiuj ni apartenas - ŝanĝiĝos, transformiĝos kaj konformiĝos laŭ la bildo de Kristo. La kristiani intencas kune strebi, sen triumfismoj, en plena humileco, en la servo al Dio kaj al la gefratoj, laŭ la ekzemplo de Jesuo Kristo. En la strebado al la unueco, ĉi tiu estas la sinteno, kiun ni deziras peti al Dio ĉiuj kune.

**Komenca preĝo**

C: Ho Dio ĉiopova, en Jesuo Kristo vi instruas al ni, ke kiu ajn deziras esti la unua, tiu devas antaŭe fariĝi lasta kaj servisto de ĉiuj. Ni stariĝas je via ĉeesto, sciante ke via venko estas akirita per la malforteco de la kruco. Ni estas ĉi tie preĝantaj ke via Eklezio fariĝu unu. Instruu al ni akcepti kun humileco, ke ĉi tiu unueco estas donaco de via Spirito; pere de ĉi tiu donaco, ŝanĝu kaj transformu nin ĉiam pli laŭ la bildo de via Filo Jesuo Kristo.
**Ĉ: Amen.**



C : Ni dankas al Vi, Sinjoro, pro ĉiuj donacoj, kiujn Vi donis al ni, por malhelpi ke ni haltu survoje aŭ malfortiĝu en nia spirita batalo, Vi, kiu vivas kaj regas eterne.
**Ĉ. : Amen.**

Oka tago
**Unuiĝintaj en la Regado de Kristo**

C. : Eltiraĵo de malnova homilio:
La trono de la keruboj estas preparita, la servistoj atendas nur ordonojn, la nupta lito estas aranĝita, la manĝaĵoj estas pretigitaj, la eternaj tendoj kaj loĝejoj estas ornamitaj. Oni malfermis la trezorojn de ĉiaj bonoj, kaj la Ĉiela Regno estas jam deeterne preta.

C. : Arde dezirante resti kun Kristo, ni adoru Lin kaj diru: Regu eterne!
**Ĉ.: Regu eterne!**

C.: Sinjoro de la tempo kaj de la eterno.
**Ĉ.: Regu eterne!**

C.: Unuenaskita el la mortintoj
**Ĉ.: Regu eterne!**

C.: Vi, kiu havas la ŝlosilojn de la morto kaj de la infero.
**Ĉ.: Regu eterne!**

C.: Vi, la Sinjoro de la sinjoroj kaj la Reĝo de la reĝoj.
**Ĉ.: Regu eterne!**

C.: Vi, kiu estis, estas kaj venos.
**Ĉ.: Regu eterne! Amen.**

C.: Je lia graco pli forta ol la peko.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

C.: Je la amo pli potenca ol la malamo kaj morto.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

C.: Je la releviĝo de la korpo kaj la eterna vivo en la Regno.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

C: Sinjoro, rigardu la fidon de Via Eklezio pilgrimanta sur la tero, kaj gvidu Viajn infanojn, por ke ili ekvidu la brilon de Via majesto, vizaĝo kontraŭ vizaĝo, Vi, kiu vivas kaj regas eterne.
**Ĉ.: Amen.**

Sepa tago
**Ŝanĝitaj de la Bona Paŝtisto**

C.: La Sinjoro ne forlasis nin. Li gvidas nin per bastono kaj vergo ĉe ĉiuj spertoj de la vivo. Li estas nia Bona Paŝtisto. Pro tio, ni diras : ni dankas al Vi, Sinjoro!
Ĉ**.: Ni dankas al Vi, Sinjoro.**

C.: Pro la vivo kaj ĉiuj donacoj, per kiuj Vi firmigas nin.
**Ĉ.: Ni dankas al Vi, Sinjoro.**

C. : Pro la dono de Via Vorto.
**Ĉ. : Ni dankas al Vi, Sinjoro.**

C.: Pro la persistemo en la kredo.
**Ĉ. : Ni dankas al Vi, Sinjoro.**

C. : Pro la kredindaj atestantoj de via Evangelio.
**Ĉ. : Ni dankas al Vi, Sinjoro.**

C. : Pro ĉio, kion ni ne povas nombri aŭ nur malfacile komprenas.
**Ĉ.: Ni dankas al Vi, Sinjoro.**



**Penta preĝo**

C: Ho Dio ĉiopova, malgraŭ la unueco kiun Kristo donacis al sia Eklezio, ni persistas en nia malunueco,
**Ĉ: Kompatu nin!**

C: Ni malmoligas nian koron malgraŭ la anonco de la evangelio,
**Ĉ: Kompatu nin!**

C: Ni malfidelas en la servado al niaj fratoj kaj al niaj fratinoj,
**Ĉ: Kompatu nin!**

C: La malobeo de Adamo kaj Eva alportis suferadon kaj morton, kaj vundis kaj malbeligis la kreitaron,
**Ĉ: Kompatu nin!**

*Sekvas momento da silento.*

C: Dio ĉiopova kompatu nin, pardonu niajn pekojn kaj konduku nin al la eterna vivo.
**Ĉ: Amen.**

## II. CELEBRADO DE LA DIA VORTO

**Himno / Kanto**

**Legaĵo el la Libro di Ĥabakuk (Aba 3, 17-19)**

La figarbo ne floras,
la vinberbranĉoj ne donas fruktojn,
la olivarbo rifuzas sian laboron,
la plugokampoj ne donas manĝaĵon,
la ŝafoj estas forkaptitaj el la ŝafejo,
kaj en la staloj ne troviĝas bovoj:
sed mi ĝojas pri la Eternulo,
mi estas gaja pri la Dio de mia savo.
Dio, la Sinjoro, estas mia forto;
Li faras miajn piedojn kiel ĉe cervo,
kaj venigas min sur miajn altaĵojn.

**Legaĵo el la Unua Letero al Korintanoj (1 Kor 15, 51-58)**

"Jen mi sciigas al vi misteron. Ni ne ĉiuj mortos, sed ni ĉiuj ŝanĝiĝos, en momento, en okula ekmovo, ĉe la lasta trumpetsono. Ĉar la trumpeto sonos, kaj la mortintoj releviĝos por ne plu morti kaj ni estos transformitaj. Ĉar estas necese, ke ĉi tiu putrema homo surmetu senputran vivon, kaj ĉi tiu mortema homo surmetu senmortan vivon. Kaj kiam ĉi tiu putrema homo estos surmetinta neputreman vivon, kaj ĉi tiu mortema homo estos surmetinta senmortan vivon, tiam plenumiĝos tio, kion diras la Skribo:
*La morto estas detruita! La venko estas plena!*
*Ho morto, kie estas via venko?*
*Ho morto, kie estas via mortiga forto?*
La morto ĉerpas sian forton el la peko, kaj la peko ĉerpas sian forton el la leĝo. Danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per Jesuo Kristo, nia Sinjoro.
Tial, miaj fratoj, estu firmaj, nemoveblaj. Estu ĉiam pli abundaj en la laboro de la Sinjoro, sciante, ke dank' al la Sinjoro via penado ne estas vanta".

**Legaĵo el la Evangelio laŭ Johano (Joh 12, 23-26)**

" Jesuo respondis: Venis la horo. La Filo de Homo estos baldaŭ glorata. Se la tritika grenero ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi ne donas frukton. Sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto. Vere, vere, mi tion diras al vi. Kiu amas sian vivon, tiu ĝin perdos. Kiu pretas perdi sian vivon en ĉi tiu mondo, tiu ĝin konservos ĝis eterna vivo. Se iu volas min servi, tiu sekvu min, kaj kie mi estas, tie ankaŭ estos miaj servantoj. Kaj kiu min servas, tiun la Patro honoros".

**Homilio / Meditado**
*Paŭzo da silento aŭ fona muziko.*

**Nicea-Kostantinopola Kredkonfeso**
La ĉi-tiea Nicea-Kostantinopola Kredkonfeso estas tiu utiligita dum la Tria Renkontiĝo de la Konferenco de la eŭropaj Eklezioj (KEK) kaj la Konsilio de la eŭropaj episkoparaj konferencoj (CCEE), Riva del Garda, 1984.



**Ĉ.: Donu al ni Vian pacon!**

C.: Prizorgu tiujn kiujn Vi vokis por gvidi Vian ŝafaron.
**Ĉ.: Donu al ni Vian pacon!**

C.: Fortigu la geedzan amon
**Ĉ.: Donu al ni Vian pacon!**

C.: Portu reakordon al la familioj, al la kvartaloj, al la societoj
**Ĉ.: Donu al ni Vian pacon!**

C.: La Sinjoro estu kun ni kaj donu al ni la unuecon kaj la pacon. Vi kiu vivas kaj regas eterne
**Ĉ.: Amen**

Sesa tago:
**Ŝanĝitaj de la Eterna Boneco de Dio**

C. : Turnante nin al tiu, kiu estas sole inda je fido, ni diras : Amen – Mi kredas.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

C.: Je unu sola Dio: Patro, Filo kaj Sankta Spirito.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

C.: Je la Filo de Dio, kiu fariĝis homo.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**
C.: Je liaj morto, releviĝo kaj ĉieliro.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

C.: Je la dono de la Santa Spirito.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

C.: Je la reveno de Kristo en gloro.
**Ĉ.: Amen – Mi kredas.**

de la preĝoj de la Sinjoro - kaj liberigu nin de la malbono - ni preĝas al Dio ke Li al ni malkovru la venkon jam gajnitan de Kristo.

Je la sama spirito ni petegas: Savu nin, Sinjoro!
**Ĉ.: Savu nin, Sinjoro!**

C.: De ĉiu malbono
**Ĉ.: Savu nin, Sinjoro!**

C.: De ĉiu peko
**Ĉ.: Savu nin, Sinjoro!**

C.: De la satanaj insidoj
**Ĉ.: Savu nin, Sinjoro!**

C.: De la malamo kaj de ĉiu malbono
**Ĉ.: Savu nin, Sinjoro!**

C.: De la eterna morto
**Ĉ.: Savu nin, Sinjoro!**

C.: Savu nin de ĉiu malbono kaj subtenu nin per via mizerikordo, Vi kiu vivas kaj regas eterne.
**Ĉ. :Amen!**

Kvina tago:
**Ŝanĝitaj per la paco de la Sinjoro releviĝinta**

C.: Ni preĝu al la Sinjoro releviĝinta por la kristanoj kaj por ĉiuj homoj sur la Tero.
**Ĉ.: Donu al ni Vian pacon!**

C.: Donu viajn benon kaj pacon al la nacioj.
**Ĉ.: Donu al ni Vian pacon!**

C.: Subtenu tiujn kiuj laboras por la videbla unueco de Via Eklezio.



C: Kaj nun ni kunigu niajn voĉojn en la kuna eldiro de la Nicea-Kostantinopola Kredkonfeso.

**Ĉ: Ni kredas je ununura Dio, la Patro ĉiopova,**
**Kreinto de la ĉielo kaj de la tero,**
**de ĉiuj aĵoj videblaj kaj nevideblaj.**
**Ni kredas je ununura Sinjoro, Jesuo Kristo,**
**Ununaskita Filo de Dio,**
**naskiĝinta el la Patro antaŭ ĉiuj jarcentoj,**
**Dio el Dio, lumo el lumo, Dio vera el Dio vera,**
**generita, ne kreita, samsubstanca kun la Patro;**
**per li ĉiuj aĵoj estis kreitaj.**
**Por ni homoj kaj por nia savo li malsupreniris el la ĉielo.**
**Kaj per la Sankta Spirito**
**li enkarniĝis en la sino de VirgulinoMaria**
**kaj fariĝis homo.**
**Li estis krucumita por ni sub Poncio Pilato.**
**Li mortis kaj estis entombigita.**
**La trian tagon li releviĝis laŭ la Skribo,**
**supreniris al la ĉielo, sidas dekstre de la Patro**
**kaj denove li venos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn,**
**kaj lia Regno estos senfina.**
**Ni kredas je la Sankta Spirito, Sinjoro kaj viviganto,**
**kaj devenas de la Patro.**
**Kun la Patro kaj la Filo li estas adorata kaj glorata,**
**kaj parolis per la profetoj.**
**Ni kredas je unu, sankta, katolika kaj apostola Eklezio.**
**Ni konfesas ununuran bapton por la pardono de la pekoj,**
**ni atendas la reviviĝon de la mortintoj**
**kaj la vivon de la estonta mondo. Amen.**

**Himno / Kanto**
*Dum la kanto, la oblatoj (tavoloj da senfermenta pano) estas antaŭenigataj kaj metataj sur tablon en la mezo.*

## III. PREĜOJ POR LA UNUECO KAJ POR ESTI TRANSFORMATAJ EN KRISTO

C: Kunigitaj en Kristo kiu donas al ni la venkon, ni preĝu Dion:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Por la Eklezio, korpo de Kristo, por ke ni vere povu travivi la unuecon kiun ni ricevas per la Sankta Spirito, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Por la responsuloj de niaj eklezioj, por ke ili povu resti fidelaj al la unueco al kiu ĉiuj kristanoj estas vokataj, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Por la nacioj de la mondo, por ke ili povu vivi reciproke en paco kaj antaŭenigi la justecon por ĉiuj, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Por ĉiu persono, por ke ĝi povu esti zorgema gardanto de la tero, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Por la personoj de niaj socioj, por ili povu esti tranformataj por vivi kiel amoplenaj najbaroj kiuj zorgas unu pri la alia, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Por tiuj kiuj estas malsanaj kaj suferas, por ke ili povu esti transformataj de via saniga ĉeesto, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Por ĉiuj familioj, por ke en siaj travivĵoj kaj en siaj ĝojoj ili povu trovi respondon en via amo, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**
C: Por la mortontoj, por ke ili povu esti konsolataj de via ĉeesto, Dio, nia forto:
**Ĉ: Pro via graco, transformu nin.**

C: Sinjoro, venu meze de ni kaj donu al ni unuecon kaj pacon.
**Ĉ: Amen.**



C.: Aŭskultu nin, Dio nia, kaj donu al ni la kapablon percepti la grandecon de via justeco.
Per Kristo nia Sinjoro.
**Ĉ.: Amen.**

Tria tago:
**Ŝanĝitaj de la suferanta Servanto**

C.: La Kruco signas la venkon. Tial ni al Vi diras: Ni adoras Vin, Sinjoro!
**Ĉ.: Ni adoras Vin, Sinjoro!**

C.: Per via Kruco, santejo de la vera tribunalo de mizerikordo
**Ĉ.: Ni adoras Vin, Sinjoro!**

C.: Per via Kruco, arbo de la Vivo kaj trono de graco
**Ĉ.: Ni adoras Vin, Sinjoro!**

C.: Per via Kruco, signo de kompato kaj espero
**Ĉ.: Ni adoras Vin, Sinjoro!**

C.: Sinjoro, vi mortis sur Kruco por kolekti en unuecon la disigitajn filojn de Dio. Faru, ke la kontemplado de Via Kruco transformu nian prisuferan komprenon.
Vi, kiu vivas kaj regas eterne.
**Ĉ.: Amen.**

Kvara tago:
**Ŝanĝitaj de la venko de la Sinjoro kontraŭ la malbono**

C.: La alveno de la Dia Regno estas la malvendo de la satana regado. Kiam Jesuo venkis super la templo en la dezerto kaj liberigis la homojn de la malbonspirita povo, Li anticipis sian grandan venkon, tiun de la Pasionhoro. Ĉimonda princo estis forigata. Per la lasta peto

La proponataj preĝoj por la tagoj 1-8 baziĝas sur la taga temo. Oni povas ilin utiligi kune kun la bibliaj legaĵoj.

Unua tago:
**Ŝanĝitaj per Kristo, la Servanto**

C.: Sinjoro! La malobeo de Adamo kaj Eva kaŭzis al ni suferojn kaj morton kaj la homa familio estis vundata kaj frakasata. Kompatu nin!
**Ĉ.: Kompatu nin!**

C.: Kristo, ni plifortigis niajn korojn kiam Vin in instruis pere de viaj vortservantoj. Kompatu nin!
**Ĉ.: Kompatu nin!**

C.: Sinjoro, Vi scias, ke ni Vin ne servis je niaj gefratoj. Kompatu nin!
**Ĉ.: Kompatu nin!**

C.: Ĉiopova Dio korfavoru nin, pardonu niajn pekojn kaj konduku nin al la eterna vivo.
**Ĉ.: Amen!**

Dua tago:
**Ŝanĝitaj per pacienca atendado de la Sinjoro**

C.: Ni preĝu al la Sinjoro. Donu al ni kapablon rigardi la vivon per la lumo de via saĝo, ni petas.
**Ĉ.: Aŭskultu nin, Sinjoro!**

C.: Donu al ni paciencon en situacioj kie la homa justeco mankas, ni petas.
**Ĉ.: Aŭskultu nin, Sinjoro!**

C.: Faru nin kapablaj preĝi kaj atendi en situacioj kie nur Via graco povas kontentigi niajn bezonojn, ni preĝas al Vi.
**Ĉ.: Aŭskultu nin, Sinjoro!**



**Patro Nia**
*Patro Nia povas ankaŭ esti kantata.*

C: Kiam la disĉiploj demandis de Jesuo, kiel ili devas preĝi, Li respondis:"Do, preĝu jene":
**Ĉ: Patro nia, kiu estas en la ĉielo,**
**sanktigata estu Via nomo,**
**venu Via regno,**
**fariĝu Via volo,**
**kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.**
**Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ**
**kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,**
**kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj,**
**kaj ne konduku nin en tenton,**
**sed liberigu nin de la malbono.**
**Via estas la regno kaj la potenco kaj la gloro eterne.**
**Amen.**

**Gesto de paco kaj interŝanĝo de oblatoj**

Estas aparta tradicio en Pollando, kiu konsistas en tio, ke oni kundividas subtilan tavolon de senfermenta pano nomata oblato (en la pola opłatek) en la hejmoj kaj en la preĝejoj je Kristnasko.

Al ĉiu persono estas donata oblato, kiun la personoj kundividas, dispecigante parton de la oblato de alia persono kaj manĝante ĝin. Tiamaniere oni reciproke interŝanĝas la bondezirojn. Ĉi tiu kundivido de la tavolo esprimas unuecon, amon kaj pardonon. Ni invitas vin fari la samon kiel signon de unueco kaj de paco.

C: La paco de la Sinjoro ĉiam estu kun vi.
**Ĉ: Kaj kun via spirito.**

C: Ni interŝanĝu pacosignon.

## IV. FINAJ RITOJ

**Himno / Kanto**
*Dum la kanto oni povas fari la monkolekton.*

**Preĝo de sindevigo**

C: Ni memoru, kion skribas apostolo Paŭlo en la unua Letero al Korintanoj:
“Danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per Jesuo Kristo, nia Sinjoro. Tial, miaj fratoj, estu firmaj, nemoveblaj. Estu ĉiam pli abundaj en la laboro de la Sinjoro, sciante, ke dank' al la Sinjoro via penado ne estas vanta”. (1 Kor 15, 57-58).

Estu laŭdo al la Sinjoro, kiu gvidas nin al la unueco! Patro, ni dediĉas ĉi tiun Preĝosemajnon por igi firma nian unuecon en Kristo. Li venkis la morton, kaj vokis nin al nova vivo en la Spirito.

Pro tio ni petas:

C: Ŝanĝitaj de Kristo, la Servanto,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**

C: Ŝanĝitaj de la pacienca atendo de la Sinjoro,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**

C: Ŝanĝitaj de la suferanta Servanto,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**

C: Ŝanĝitaj de la venko de la Sinjoro kontraŭ la malbono,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**

C: Ŝanĝitaj de la paco de la releviĝinta Sinjoro,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**

C: Ŝanĝitaj de la mizerikorda amo de Dio,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**



Kriston en siajn hejmojn, ĉiuj estos invititaj dividi kun li la bankedon de eterna vivo. La promeso koncerne sidadon sur tronoj, antaŭe anoncita al la Dek Du, nun estas farita al ĉiuj venkantoj.

"Kie mi estas, tie ankaŭ estos mia servanto". Ni povas ligi la "mi estas" de Jesuo al la ne-eldirebla Nomo de Dio. La servanto de Jesuo, kiun la Patro honoras, estos tie, kie lia Sinjoro estas, kiu sidiĝas dekstre de la Patro por regadi.Kristanoj scias, ke unueco inter ili, eĉ se tio bezonas homan penon, estas antau ĉio donaco de Dio. Ĝi estas partopreno en la venko de Kristo kontraŭ peko, morto kaj la malbonagoj kiuj kaŭzas disigon. Nia partopreno en la venko de Kristo atingas sian plenecon en la Ĉielo. Nia komuna atesto pri la Evangelio devus montri al la mondo Dion kiu nek limigas nek superfortas nin. Ni devus anonci laŭ kredinda maniero, al la homoj de nia epoko, ke la venko de Kristo venkas ĉion, kio malhelpas ke ni dividu la plenecon de la vivo kun Li kaj kun unu la alia.

**Preĝo**

Ĉiopova Dio, Reganto de ĉiuj, instruu al ni kontempli la misteron de Via gloro. Donu, ke ni povu akcepti Viajn donacojn kun humilo, kaj respekti la dignon de ĉiu persono. Ke Via Sankta Spirito fortigu nin por la spiritaj bataloj kiuj atendas nin, tiel, ke, unuiĝintaj en Kristo, ni povu regadi kun Li en gloro. Donu ĉi tion per Li, kiu humiligis Sin kaj estis altigita, kiu vivas kun Vi kaj la Sankta Spirito, ĉiam kaj eterne. Amen.

**Demandoj por persona meditado**

1. Laŭ kiuj manieroj falsa humilo kaj deziro por surtera gloro manifestiĝas en niaj vivoj?
2. Kiel ni kune esprimas nian fidon al la Regado de Kristo?
3. Kiel ni povas esprimi per nia vivo nian esperon al la venonta Regno de Dio?

*Apokalipso 3, 19b-22 Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono*

La Sinjoro diris: Ĉiujn, kiujn mi amas, mi riproĉas kaj punas; estu do fervora, kaj pentu. Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas; se iu aŭdas mian voĉon kaj malfermas la pordon, mi eniros al li kaj manĝos kun li, kaj li kun mi. Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono, kiel mi ankaŭ venkis kaj sidiĝis kun mia Patro sur lia trono. Kiu havas orelon, tiu aŭskultu, kion la Spirito diras al la eklezioj.

*Johano 12, 23-26 Se iu min servas, tiun la Patro honoros.*

Jesuo respondis al ili, dirante: Venis la horo, por ke la Filo de homo estu glorata. Vere, vere, mi diras al vi: Se la tritika grenero ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi restas sola; sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto. Kiu amas sian vivon, tiu ĝin perdas; kaj kiu malamas sian vivon en ĉi tiu mondo, tiu ĝin konservos ĝis eterna vivo. Se iu min servas, tiu sekvu min; kaj kie mi estas, tie ankaŭ estos mia servanto; se iu min servas, tiun la Patro honoros.

**Komento**

Jesuo Kristo estas la unuenaskita el la mortintoj. Li humiligis sin, kaj estas altigita. Kristo ne retenas al si sian venkon, sed dividas sian regadon kaj altigon kun ĉiuj homoj.

La himno de David, naskiĝinta el la ĝojo de la reĝo kaj la popolo antaŭ la konstruigo de la Templo, esprimas la veron, ke ĉio okazas pere de graco. Eĉ surtera monarĥo povas esti bildo de la regado de Dio, kies mano "povas ĉion grandigi kaj fortikigi".

La psalmo de dankado fare de la reĝo daŭrigas ĉi tiun ideon. La kristana tradicio ankaŭ donas al ĝi mesianisman signifon; Kristo estas la vera Reĝo, plena de beno kaj vivo, la perfekta ĉeesto de Dio ĉe homoj. Iusence, ĉi tiu bildo ankaŭ povas rilati al homoj. Ĉu homoj ne estas la krona atingo de la kreitaro? Ĉu Dio ne deziras ke ni fariĝu kunheredantoj kun Lia Filo kaj membroj de Lia reĝa domanaro?

La leteroj en la Apokalipso al la sep lokaj eklezioj konsistigas mesaĝon al la Eklezio en ĉiuj tempoj kaj lokoj. Tiuj, kiuj akceptos



C: Ŝanĝitaj de la bona Paŝtisto,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**

C: Unuiĝintaj en la Regado de Kristo,
**Ĉ: Sendu nin kaj, kune, ni iros.**

**Beno kaj Forsendo**

*La beno povas esti disdonata de kelkaj pastroj en la suba formo, aŭ en alia formo*

C: La Sinjoro estu ku vi.
**Ĉ: Kaj kun via spirito.**

C: La Sinjoro vin benu kaj vin gardu!
La Sinjoro lumu al vi per Sia vizaĝo
kaj favorkoru vin.
La Sinjoro turnu al vi Sian vizaĝon
kaj donu al vi pacon kaj feliĉon.
**Ĉ: Amen.**

**aŭ**

C: La beno de Dio ĉiopova, la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, malsupreniru sur vin.
**Ĉ: Amen.**

C: Iru en la paco de Kristo.
**Ĉ: Al Dio estu danko!**

*Fina kanto*

Bibliaj meditadoj kaj preĝoj por la "ok tagoj"

**LA UNUA TAGO**

**Ŝanĝitaj per Kristo, la Servanto**
**La Filo de homo venis por servi (kp. Mar 10, 45)**

**Legaĵoj**

*Zeĥarja 9, 9-10 La justa kaj venkanta reĝo – kaj humila*

Ĝoju forte, ho filino de Cion,
triumfu, ho filino de Jerusalem;
jen via reĝo iras al vi;
justa kaj helpema li estas,
humila kaj rajdanta sur azeno,
sur ido de azenino.
Ĉar mi ekstermos ĉarojn ĉe Efraim
kaj ĉevalojn en Jerusalem,
kaj ekstermita estos milita pafarko;
li proklamos pacon al la nacioj,
kaj lia regado estos de maro ĝis maro,
de la Rivero
ĝis la finoj de la tero.

*Psalmo 131(130), 1-3*
*Kanto de suprenirado. De David.*
Ho Sinjoro, ne tenas sin alte mia koro,
kaj ne leviĝas alte miaj okuloj;
Kaj mi ne okupas min per aferoj grandaj
Mi trankviligis kaj kvietigis mian animon;
Kiel infano formetita for de la mamo de sia patrino,
kiel infano demamigita,
Tiel estas en mi mia animo.
Ho Izrael, fidu la Sinjoron,
De nun kaj eterne.



**LA OKA TAGO:**

**Unuiĝintaj en la Regado de Kristo**
**Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono (Apo 3,21)**

**Legaĵoj**

*1 Kroniko 29, 10-13 Via mano povas ĉion grandigi kaj fortikigi.*

David diris: Estu benata, ho Sinjoro, Dio de nia patro Izrael, eterne kaj eterne. Al vi, ho Sinjoro, apartenas grandeco, potenco, majesto, venko, kaj gloro, ĉar ĉio en la ĉielo kaj sur la tero estas via; al vi, ho Sinjoro, apartenas la reĝado, kaj vi estas alte super ĉiuj estroj. Riĉeco kaj honoro venas de vi; vi regas super ĉio; en via mano estas forto kaj potenco; via mano povas ĉion grandigi kaj fortikigi.

*Psalmo 21(20), 1-8 Vi metis sur lian kapon kronon el pura oro*
*Al la ĥorestro. Psalmo de David.*

Ho Sinjoro, pro via forto ĝojas la reĝo,
Kaj pro via helpo kiel forte li triumfas!
Kion lia koro deziris, tion vi donis al li;
kaj la peton de lia buŝo vi ne rifuzis.
Vi antaŭvenas al li kun beno de bono;
vi metis sur lian kapon kronon el pura oro.
Vivon li petis de vi;
kaj vi donis al li longan vivon por ĉiam kaj eterne.
Granda estas lia honoro pro via helpo;
gloron kaj majeston vi metis sur lin.
Vi donas al li eternajn benojn;
vi gajigas lin per ĝojo antaŭ via vizaĝo.
Ĉar la reĝo fidas la Sinjoron,
kaj pro favoro de la Plejaltulo li ne falos.

En la Letero al Efesanoj, apostolo Paŭlo alvokas al ni "fortiĝu en la Sinjoro kaj en la forteco de lia potenco", surmetante spiritan armilaron: veron, justecon, sciigi la Bonan Novaĵon, fidon, savon, la vorton de Dio, preĝadon kaj petegadon.

La releviĝinta Sinjoro alvokas al Petro - kaj, pere de li, al ĉiu disĉiplo - eltrovi en si amon al Li kiu sola estas la Ununura Vera Paŝtisto. Se vi havas tian amon, do "Paŝtu miajn ŝafojn"! Alivorte, paŝtu ilin, protektu ilin, prizorgu ilin, fortigu ilin - ĉar ili estas miaj kaj apartenas al mi! Estu mia bona servanto kaj flegu tiujn, kiuj amis min kaj kiuj sekvas mian voĉon. Instruu al ili reciprokan amon, kunlaboron kaj aŭdacon dum ili laŭiras la serpentumadon de la vivo.

Kiel rezulto de la dia graco, la atesto pri Kristo, kiu estas konfirmita en ni, devigas nin agi komune por atingi unuecon. Ni havas la kapablon kaj la scion por tiel atesti! Sed ĉu ni volas? La Bona Paŝtisto, kiu per sia vivo, instruado kaj konduto fortigas ĉiujn, kiuj fidas al Lia graco kaj subteno, invitas nin kunlabori kun Li senkondiĉe. Tiel fortikigite, ni povos helpi unu la alian sur la vojo al unueco. Ni do fortiĝu en la Sinjoro, por ke ni fortigu aliulojn en komuna atesto de amo.

**Preĝo**

Patro de ĉiuj, vi alvokas nin por esti unu grego en Via Filo, Jesuo Kristo. Li estas nia Bona Paŝtisto kiu invitas nin ripozi sur verdaj herbejoj, kondukas nin apud trankvilaj akvoj, kaj kvietigas niajn animojn. Dum ni sekvas lin, ke ni tiel prizorgu aliulojn, ke ĉiuj vidu en ni la amon de la unika vera Pastiŝto, Jesuo Kristo nia Sinjoro, kiu vivas kaj regas kun Vi kaj la Sankta Spirito, unu Dio ĉiam kaj eterne. Amen.

**Demandoj por persona meditado**

1. Kiel la Bona Pastiŝto inspiras nin trankviligi kaj revivigi tiuj, kiuj perdis la vojon?
2. Laŭ kiuj manieroj kristanoj de diversaj tradicioj povas fortigi unu la alian kiam ili konfesas kaj atestas pri Jesuo Kristo?
3. Por ni hodiaŭ, kion povas signifi la instigo de sankta Paŭlo: "Fortiĝu



*Romanoj 12, 3-8 Ni havas diversajn donacojn, per kiuj ni servas*

Mi diras al ĉiu el vi, per la graco al mi donita, ke li ne tro estimu sin, sed estimu sin kun modereco, laŭ mezuro de la fido, kiun Dio disdonis al ĉiu. Ĉar kiel ni havas multajn membrojn en unu korpo, kaj ne ĉiuj membroj havas la saman funkcion, tiel same ni multaj estas unu korpo en Kristo, kaj ĉiuj aparte membroj unu de alia. Sed havante donacojn diversajn laŭ la graco donita al ni, ĉu profetadon, ni profetu laŭ la mezuro de nia fido; aŭ servadon, ni laboru en nia servado; aŭ instruanto, en sia instruado; aŭ admonanto, en sia admonado; la disdonanto agu malavare, la administranto kun diligenteco, la kompatanto kun ĝojo.

*Marko 10, 42-45 La Filo de homo venis por servi*

Tiam Jesuo, alvokinte ilin al si, diris al ili: Vi scias, ke tiuj, kiuj pretendas regi la nacianojn, kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Sed ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto; kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu sklavo de ĉiuj. Ĉar la Filo de homo venis, ne por esti servata, sed por servi, kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj.

**Komento**

La alveno de la Mesio kaj Lia venko estis realigitaj per servo. Jesuo volas, ke spirito de servo plenigu la korojn ankaŭ de Liaj sekvantoj. Li instruas nin, ke la vera grandeco konsistas en servado al Dio kaj niaj proksimuloj. Kristo donas al ni kuraĝon malkovri, ke Li estas tiu, por kiu *servi signifas reĝi* – kiel diras unu fruepoka kristana diraĵo.

La profetaĵo de Zeĥarja pri la venkanta kaj humila Reĝo estas plenumita en Jesuo Kristo. Li, la Reĝo de Paco, venas al siaj propraj, en Jerusalemon – la Urbon de Paco. Li ne konkeras ĝin per trompo aŭ perforto, sed per ĝentileco kaj humileco.

Psalmo 131 koncize, sed elokvente priskribas la staton de spirita paco, kiu estas la frukto de humileco. La bildo de patrino kaj infano estas signo de Dia tenera amo kaj konfido en Dio, al kiu la tuta

komunumo de kredantoj estas vokita.

Apostolo Paŭlo alvokas nin sobre kaj humile pritaksi nin mem kaj malkovri niajn kapablecojn. Kvankam ni havas diversajn donacojn, ni estas unu korpo en Kristo. En nia dividiteco la Sinjoro pridonacis ĉiun nian tradicion per donacoj, kiujn ni devas doni al la servo por aliaj.

*Ĉar la Filo de homo venis ne por esti servata, sed por servi kaj doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj* (Mar 10,45). Kristo per sia servo elaĉetis nian rifuzon servi al Dio. Li iĝis ekzemplo por ripari ĉiujn rilatojn inter homoj: *Tiu, kiu volas esti granda inter vi, devas esti via servanto* – tio estas novaj stiloj de grandeco kaj prioritato.

Paŭlo en la Letero al Romanoj rememorigas nin, ke diversaj donacoj, kiuj estas donitaj al ni, estas por servo: profetado, servo, instruado, kuraĝigado, donado, gvidado kaj kompato. En nia diverseco ni ĉiam estas unu korpo en Kristo kaj membroj unu por la alia. La uzado de niaj diversaj donacoj en la komuna servo por la homaro videbligas nian unuecon en Kristo. La komuna agado de kristanoj por la bono de la homaro, por batali kontraŭ malriĉeco kaj malklereco, por defendi la subpremitajn, por interesiĝi pri paco, por prezervi vivon, evoluigi sciencon, kulturon kaj arton estas la esprimo de la praktika ekumenismo, kiun Eklezio kaj la mondo ege bezonas. La imitado de Kristo Servanto donas elokventan ateston pri la evangelio, kiu ne movigas nur niajn mensojn, sed ankaŭ korojn. Ĉi tiu komuna servo estas la signo de la alproksimiĝanta Regno de Dio – la regno de Kristo, la Servanto.

**Preĝo**

Ĉiopova kaj eterna Dio, irante laŭ la reĝa vojo de servo via Filo kondukas nin de aroganteco de nia malobeemo al la humileco de la koro. Unuigu nin per via Sankta Spirito, por ke per servo al niaj gefratoj, estu revelaciita via vera vizaĝo; Vi, kiu vivas kaj regas eterne. Amen.



kiu estas la vorto de Dio; per ĉia preĝado kaj petegado en ĉiu tempo preĝante en la Spirito, kaj viglante por tio en ĉia persisteco kaj petego por ĉiuj sanktuloj, kaj por mi, ke al mi estu donita parolpovo kun malfermo de mia buŝo, por ke mi sciigu kuraĝe la misteron de la evangelio, pro kiu mi estas ambasadoro en kateno, por ke mi parolu kuraĝe en ĝi, kiel mi devus paroli.

*Johano 21, 15-19 Paŝtu miajn ŝafojn*

Post la matenmanĝo Jesuo diris al Simon Petro: Simon, filo de Jona, ĉu vi amas min pli, ol tiuj? Li diris al li: Jes, Sinjoro; vi scias, ke mi vin amas. Li diris al li: Paŝtu miajn ŝafidojn. Li diris al li ankoraŭ la duan fojon: Simon, filo de Jona, ĉu vi min amas? Li diris al li: Jes, Sinjoro; vi scias, ke mi vin amas. Li diris al li: Zorgu pri miaj ŝafoj. Li diris al li la trian fojon: Simon, filo de Jona, ĉu vi min amas? Petro ĉagreniĝis, ke li diris al li la trian fojon: Ĉu vi min amas? kaj respondis al li: Sinjoro, vi scias ĉion; vi scias, ke mi vin amas. Jesuo diris al li: Paŝtu miajn ŝafojn. Vere, vere, mi diras al vi: Kiam vi estis juna, vi zonis vin, kaj iris, kien vi volis; sed kiam vi maljuniĝos, vi etendos viajn manojn, kaj alia vin zonos, kaj portos vin, kien vi ne volos. Tion li diris, montrante per aludo, per kia morto li gloros Dion. Kaj dirinte tion, li diris al li: Sekvu min.

**Komento**

Tiuj, kiuj venkas suferon, bezonas subtenon de supre. Tiu subteno venas per preĝado. Ni legas pri la potenco de la preĝo de Ĥana en la unua ĉapitro de la Libro de Samuelo. En la dua ĉapitro, ni povas trovi ŝian preĝon de dankado. Ŝi konsciis ke iuj aferoj okazas sole per la helpo de Dio. Estis pere de Lia volo ke Ĥana kaj ŝia edzo gepatriĝis. Ĉi tiu teksto estas ekzemplo kiu fortigas nian fidon en situacio kiu ŝajnas esti senespera. Ĝi estas ekzemplo de venko.

La Bona Paŝtisto de psalmo 23-a gvidas sian ŝafaron eĉ tra la plej mallumaj lokoj, trankviligante ilin per sia ĉeesto. Tiuj, kiuj fidas al la Sinjoro, ne devas timi eĉ la ombrojn de disigo aŭ malunueco, ĉar ilia paŝtisto gvidos ilin en la verdajn paŝtejojn de la vero, por loĝi kune en la propra domo de la Sinjoro.

ĉar ne per sia forto potenciĝas la homo.
La Sinjoro pereigas tiujn, kiuj ribelas kontraŭ li;
el la ĉielo li tondras kontraŭ ili.
La Sinjoro juĝos la finojn de la tero,
kaj donos forton al Sia reĝo,
kaj altigos la kornon de Sia sanktoleito.

*Psalmo 23(22), 1-6 Vi estas kun mi; Via bastono kaj apogigilo trankviligos min.*

*Psalmo de David*
La Sinjoro estas mia paŝtisto; mi mankon ne havos.
Sur verdaj herbejoj li ripozigas min,
apud trankvilaj akvoj li kondukas min.
Li kvietigas mian animon;
li kondukas min laŭ vojo de la vero, pro Sia nomo.
Eĉ kiam mi iros tra valo de densa mallumo,
mi ne timos malbonon, ĉar vi estas kun mi;
via bastono kaj apogiĝilo trankviligos min.
Vi kovras por mi tablon antaŭ miaj malamikoj;
vi ŝmiris per oleo mian kapon, mia pokalo estas plenigita.
Nur bono kaj favoro sekvos min en la daŭro de mia tuta vivo;
kaj mi restos en la domo de la Sinjoro eterne.

*Efesanoj 6, 10-20 Fortiĝu en la Sinjoro*

Cetere, fortiĝu en la Sinjoro kaj en la forteco de lia potenco. Surmetu la tutan armilaron de Dio, por ke vi povu kontraŭstari al la artifikoj de la diablo. Ĉar nia luktado estas ne kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ regantoj, kontraŭ aŭtoritatoj, kontraŭ mondpotenculoj de la nuna mallumo, kontraŭ la spiritaroj de malbono en la ĉielejoj. Tial prenu al vi la tutan armilaron de Dio, por ke vi povu rezisti en la malbona tago, kaj, farinte tion, stari. Staru do, ĉirkaŭzoninte la lumbojn per vero, kaj surmetinte la kirason de justeco, kaj enŝuiginte la piedojn per la pretiĝo de la evangelio de paco; super ĉio tenante la ŝildon de fido, per kiu vi povos estingi ĉiujn fajrajn sagojn de la malbonulo. Kaj ricevu la kaskon de savo, kaj la glavon de la Spirito,



**Demandoj por meditado**

1. Kiujn oportunojn por servo estas plej multe endanĝerigitaj per fiero kaj aroganteco?
2. Kio devas esti farata, por ke ĉiuj kristanaj servoj estu pli bone spertataj kiel servo?
3. En nia komunumo kion povas kristanoj de diversaj tradicioj fari pli bone kune ol en izoliteco por revelacii Servanton Kriston?

## LA DUA TAGO:

**Ŝanĝitaj per pacienca atendado de la Sinjoro**
**Lasu tion, ĉar estas ĝuste por plenigi la justecon (Mar 3,15)**

**Legaĵoj**

*1 Samuel 1, 1-20 Konfido kaj pacienca atendado de Hannah*

Estis unu viro el Ramataim-Cofim, de la monto de Efraim; lia nomo estis Elkana, filo de Jeroĥam, filo de Elihu, filo de Toĥu, filo de Cuf, Efratano. Li havis du edzinojn; la nomo de unu estis Ĥana, kaj la nomo de la dua estis Penina. Penina havis infanojn, sed Ĥana ne havis infanojn. Tiu viro ĉiujare iradis el sia urbo, por adorkliniĝi kaj fari oferon al la Sinjoro Cebaot en Ŝilo; kaj tie Ĥofni kaj Pineĥas, du filoj de Eli, estis pastroj de la Sinjoro. Unu tagon Elkana faris oferon, kaj li donis al sia edzino Penina kaj al ĉiuj ŝiaj filoj kaj filinoj partojn; kaj al Ĥana li kun malĝojo donis unu parton, ĉar Ĥanan li amis, sed la Sinjoro ŝlosis ŝian uteron. Kaj ŝia konkurantino afliktis ŝin kaj tre incitis ŝin kaŭze de tio, ke la Sinjoro ŝlosis ŝian uteron. Tiel estis farate ĉiujare; kiam ŝi iradis al la domo de la Sinjoro, la konkurantino tiel incitadis ŝin, ke ŝi ploris kaj ne manĝis. Kaj ŝia edzo Elkana diris al ŝi: Ĥana, kial vi ploras? kaj kial vi ne manĝas? kaj kial tiel afliktiĝas via koro? ĉu mi ne estas por vi pli bona ol dek filoj? Kaj Ĥana leviĝis, manĝinte en Ŝilo kaj trinkinte. Kaj la pastro Eli sidis sur seĝo ĉe la fosto de la templo de la Sinjoro. Kaj ŝi estis tre malĝoja, kaj preĝis al la Sinjoro, kaj forte ploris. Kaj ŝi faris sanktan promeson, kaj diris: Ho Sinjoro Cebaot! se vi rigardos la suferon de via sklavino kaj rememoros min kaj ne forgesos vian sklavinon kaj donos al via sklavino idon virseksan, tiam mi fordonos lin al la Sinjoro por la tuta tempo de lia vivo, kaj tondilo ne tuŝos lian kapon. Dum ŝi longe preĝis antaŭ la Sinjoro, Eli atente rigardis ŝian buŝon. Ĥana parolis en sia koro; nur ŝiaj lipoj moviĝadis, sed ŝian voĉon oni ne aŭdis; tial Eli pensis, ke ŝi estas ebria. Kaj Eli diris al ŝi:

-Kiel longe vi restos ebria? forigu vian vinon el vi.

Sed Ĥana respondis kaj diris:



## LA SEPA TAGO:

**Ŝanĝitaj de la Bona Paŝtisto**
**Paŝtu miajn ŝafojn (Joh 21,19)**

**Legaĵoj**
*1 Samuel 2, 1-10 Ne per sia forto potenciĝas la homo.*

Kaj Ĥana preĝis kaj diris:
Ĝojas mia koro pri la Sinjoro,
mia korno altiĝis pro la Sinjoro;
larĝe malfermiĝis mia buŝo kontraŭ miaj malamikoj,
ĉar mi ĝojas pro via helpo.
Neniu estas tiel sankta, kiel la Sinjoro;
ĉar ekzistas neniu krom vi,
kaj nenia defendanto simila al nia Dio.
Ne parolu plu fieraĵon;
malhumilaĵo ne eliru plu el via buŝo;
ĉar la Sinjoro estas Dio ĉioscianta,
Kaj li starigis la aferojn.
La pafarko de la fortuloj estas senvalorigata,
kaj la malfortuloj zoniĝas per forto.
Satuloj sin dungigas pro pano,
kaj malsatuloj jam ne malsatas;
Senfruktulino naskis sep,
kaj multinfanulino senfortiĝis.
La Sinjoro mortigas kaj vivigas,
malsuprigas en Ŝeolon kaj suprigas.
La Sinjoro malriĉigas kaj riĉigas,
malaltigas kaj altigas.
Li levas malriĉulon el polvo,
el koto li altigas senhavulon,
por sidigi lin kun altranguloj,
kaj tronon de gloro li heredigas al li;
ĉar al la Sinjoro apartenas la fundamentoj de la tero,
kaj sur ili li starigis la mondon.
La piedojn de Siaj piuloj li gardas,
kaj la malvirtuloj pereas en mallumo;

nin al Vi kaj unu al la alia en la ligoj de amikeco, ke ni povu fidele servi Vin en ĉi tiu mondo kiel atestantoj pri Via eterna amo; ĉar Vi vivas kaj regas kun la Patro kaj la Sankta Spirito, unu Dio ĉiam kaj eterne. Amen.

**Demandoj por persona meditado**

1. Kiel ni esprimu kristanan amon en kuntekstoj de aliaj religioj kaj filozofioj?
2. Kion ni devas fari por fariĝi pli kredindaj atestantoj pri la eterna boneco de Dio en dividita mondo?
3. Kiel la sekvantoj de Kristo povas pli videble subteni unu la alian tutmonde?



-Ne, mia sinjoro, mi estas virino kun malĝoja koro; vinon aŭ ebriigaĵon mi ne trinkis, mi nur elverŝas mian animon antaŭ la Sinjoro. Ne opiniu pri via sklavino, ke ŝi estas virino malmorala; pro mia granda malĝojo kaj sufero mi parolis ĝis nun.

Tiam Eli respondis kaj diris:

- Iru en paco, kaj la Dio de Izrael plenumos vian peton, kiun vi petis de li.

Kaj ŝi diris:

- Via sklavino akiru vian favoron.

Kaj la virino iris sian vojon, kaj ŝi manĝis, kaj ŝia vizaĝo ne estis plu malgaja.

Kaj ili leviĝis frue matene kaj adorkliniĝis antaŭ la Sinjoro, kaj reiris kaj venis al sia domo en Rama. Kaj Elkana ekkonis sian edzinon Ĥana, kaj la Sinjoro rememoris ŝin. Post kelka tempo Ĥana gravediĝis kaj naskis filon, kaj ŝi donis al li la nomon Samuel, ĉar: De la Sinjoro mi lin elpetis.

*Psalmo 40(39), 1-18*

*Al la ĥorestro. Psalmo de David.*

Mi atende esperis al la Sinjoro,
kaj li kliniĝis al mi kaj aŭskultis mian krion.
Kaj li eltiris min el la pereiga foso, el la ŝlima marĉo,
kaj li starigis sur roko mian piedon kaj fortikigis miajn paŝojn.
Kaj li metis en mian buŝon novan kanton, laŭdon al nia Dio.
Multaj tion vidos kaj ektimos, kaj ili esperos al la Sinjoro.
Feliĉa estas la homo, kiu metis sian esperon sur la Sinjoron
kaj ne turnis sin al la fieruloj kaj al la mensogemuloj.
Multon vi faris, ho Sinjoro, mia Dio!
Viaj mirakloj kaj pensoj estas pri ni.
Neniu egalas vin.
Mi rakontos kaj parolos, sed ili estas super ĉiu kalkulo.
Oferojn kaj donacojn vi ne deziras;
la orelojn vi malfermis al mi;
bruloferojn kaj pekoferojn vi ne postulas.

Tiam mi diris: Jen mi venas; en la skribrulaĵo estas skribite pri mi.
Plenumi vian volon, mia Dio, mi deziras, kaj viaj ordonoj estas en mia koro.
Mi predikas justecon en granda kunveno;
jen mi ne fermas mian buŝon, ho Sinjoro, vi tion scias.
Vian justecon mi ne kaŝis en mia koro, pri via fideleco kaj via helpo mi parolis;
Mi ne kaŝis vian favorkorecon kaj vian verecon antaŭ la granda kunveno.
Vi, ho Sinjoro, ne fermu vian favorkorecon antaŭ mi,
via boneco kaj via vereco ĉiam min gardu.
Ĉar ĉirkaŭis min suferoj sennombraj,
atingis min miaj kulpoj, ke mi ne povas vidi;
ili estas pli multenombraj, ol la haroj sur mia kapo, kaj mia koro min forlasis.
Volu, ho Sinjoro, savi min; ho Sinjoro, rapidu helpi min.
Hontiĝu kaj konfuziĝu tiuj, kiuj volas pereigi mian animon;
retiriĝu kaj estu mokataj tiuj, kiuj deziras al mi malbonon.
Teruritaj estu de sia honto tiuj, kiuj diras al mi: Ha, ha!
Gaju kaj ĝoju pro vi ĉiuj viaj serĉantoj;
La amantoj de via helpo diru ĉiam: Granda estas la Sinjoro.
Kaj mi estas mizera kaj malriĉa; mia Sinjoro pensu pri mi.
Vi estas mia helpo kaj mia savanto; ho mia Dio, ne malrapidu.

*Hebreoj 11, 32-34 Per fido ili konkeris regnojn kaj priservis justecon*

Kaj kion mi diru plu? ĉar mankus al mi tempo por rakonti pri Gideon kaj Barak kaj Ŝimŝon kaj Jiftaĥ kaj David kaj Samuel kaj la profetoj; kiuj pere de fido venkis regnojn, plenumis justecon, atingis promesojn, fermis la buŝojn de leonoj, estingis la forton de fajro, forsaviĝis de la tranĉrando de glavo, el malforteco refortiĝis, fariĝis potencaj en militado, forkurigis armeojn de fremduloj.

*Mateo 3, 13-17 Lasu tion, ĉar estas ĝuste por plenigi la justecon*



**Komento**

En la teksto de la Malnova Testamento, estas fido al Dio kiu tenas viva la esperon, malgraŭ ĉiuj malsukcesoj. La lamentado de Ĥabakuk fariĝas ĝojado pri la fideleco de Dio kiu havigas forton fronte al malespero.

Psalmo 136-a konfirmas, ke la memoro de la mirindaj faroj de Dio en la historio de Izraelo, estas pruvo de la eterna boneco de Dio. Pro la interveno de Dio, la Izraelidoj spertis eksterordinarajn kaj surprizajn venkojn. Rememorigi al si la grandajn laborojn de elsavo faritajn de Dio estas fonto de ĝojo, dankemo kaj espero, kiujn kredantoj dum jarcentoj esprimis preĝe, muzike, kaj per himnoj de laŭdo.

La letero rememorigas nin, ke "ĉio, kio el Dio naskiĝis, venkas la mondon". Tio ne nepre signifas venkojn kiujn oni povas mezuri laŭ homaj normoj. La venko en Kristo necesigas opiniŝanĝon, percepti la surteran realaĵon laŭ la vidpunkto de la eterno, kaj kredi je la fina venko kontraŭ morto. Ĉi tiu venkanta forto estas la fido, kies donanto kaj fonto estas Dio. Kaj ĝia plej perfekta manifestigo estas amo.

Laŭ la vortoj de la Evangelio, Kristo certigas al siaj disĉiploj ke Dio amas ilin, kaj fine konfirmas tion per la morto de la Savanto sur la kruco. Samtempe, Li invitas kaj defias ilin montri amon unu al la alia. La rilato inter Jesuo kaj liaj disĉiploj estas bazita sur amo. Li ne traktas ilin kiel nurajn disĉiplojn, sed nomas ilin Siaj amikoj. Ilia servo al Kristo konsistas el tio, ke ili konformiĝas siajn vivojn al la unu ordono de amo, kiel rezulto de interna konvinkiĝo kaj fido. En spirito de amo, eĉ kiam la progreso survoje al plena videbla unueco ŝajnas malrapida, ni ne senesperiĝas. La eterna boneco de Dio ebligos, ke ni venkos la plej grandan oponanton kaj la plej profundajn dividojn. Estas tial, ke la venko venkinta la mondon estas nia fido kaj la transforma potenco de la amo de Dio.

**Preĝo**

Sinjoro Jesuo Kristo, Filo de la vivanta Dio, per Via Releviĝo Vi triumfis super la morto, kaj fariĝis la Sinjoro de la vivo. Pro amo al ni, Vi elektis nin por ke ni estu Viaj amikoj. Ke la Sankta Spirito unuigu

Gloru la Dion de la ĉielo,
ĉar eterna estas lia boneco.

*1 Johano 5, 1-6 Jen estas la venko venkinta la mondon: nia fido*

Ĉiu, kiu kredas, ke Jesuo estas la Kristo, naskiĝis el Dio; kaj ĉiu, kiu amas la Naskinton, amas ankaŭ la naskiton el li. Per tio ni ekscias, ke ni amas la infanojn de Dio, kiam ni amas Dion kaj plenumas liajn ordonojn. Ĉar jen estas la amo al Dio: ke ni observas liajn ordonojn; kaj liaj ordonoj ne estas pezaj. Ĉar ĉio, kio el Dio naskiĝis, venkas la mondon; kaj jen estas la venko venkinta la mondon: nia fido. Kaj kiu estas la venkanto de la mondo, krom tiu, kiu kredas, ke Jesuo estas la Filo de Dio? Ĉi tiu estas la veninto per akvo kaj sango, Jesuo Kristo; ne sole en la akvo, sed en la akvo kaj en la sango. Kaj la Spirito estas la atestanto, ĉar la Spirito estas la vero.

*Johano 15, 9-17 Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj.*

Jesuo diris: «Kiel la Patro min amis, tiel mi ankaŭ vin amis; restadu en mia amo. Se vi observos miajn ordonojn, vi restados en mia amo tiel same, kiel mi observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en lia amo. Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena. Jen estas mia ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis. Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion mi al vi ordonas. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion mi aŭdis de mia Patro, mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de li en mia nomo. Tion mi ordonas al vi, por ke vi amu unu la alian».



Tiam venis Jesuo el Galileo al Jordan al Johano, por esti baptata de li. Sed tiu lin malakceptis, dirante: Mi bezonas esti baptata de vi, kaj ĉu vi venas al mi? Sed Jesuo responde diris al li: Lasu do, ĉar tiel decas al ni plenumi ĉian justecon. Tiam li lasis lin. Kaj Jesuo, baptite, supeniris tuj el la akvo; kaj je ĉielo malfermiĝis kaj li vidis la Spiriton de Dio malsuprenirantan keil kolombo, kaj venantan sur Lin; kaj jen voĉo el la ĉielo, dirante: Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata, en kiu Mi havas plezuron.

**Komento**

Venko estas ofte ligita kun tuja triumfo. Ĉiu konas la guston de sukceso, kiam post malfacila batalo oni gratulas, agnoskas kaj eĉ festas la sukceson. Dum ĉi tiu ĝojplena momento preskaŭ neniu konscias, ke laŭ la kristana perspektivo venko estas longedaŭra procedo de transformiĝo. Ĉi tiu kompreno de transforma venko instruas nin, ke ĝi okazas en Dia tempo kaj ne nia tempo. Ĝi postulas nian paciencan konfidon kaj profundan esperon en Dio. Ĥana atestis pri ĉi tiu pacienca konfido kaj espero. Post multaj jaroj de atendado de gravedeco, ŝi preĝis al Dio por infano, eĉ kun risko, ke la pastro ĉe la pordo de la Templo primokos ŝian ploreman preĝon kiel ebriecon. Kiam Eli certigis ŝin, ke Dio elaŭdos ŝian preĝon, ŝi simple konfidis, atendis kaj ne plu estis malĝoja. Ĥana koncipis kaj naskis filon, kiun ŝi nomis Samuel. La granda venko ĉi tie ne estas venko de nacioj aŭ armeoj, sed rigardo al la areo de privata kaj persona batalo. Finfine konfido kaj espero de Ĥana rezultiĝis ne nur en ŝian propran transformiĝon, sed ankaŭ en transformiĝon de ŝia popolo, por kiu Dio de Izrael intervenes per ŝia filo Samuel.

La psalmisto eĥas la paciencan atendadon de Ĥana por la Sinjoro meze de alia batalo. Ankaŭ la psalmisto serĉis liberigon de la situacio, kiu estas nekonata al ni, sed ĝi estas aludita en la esprimo "malespera truo de koto". Li dankas, ke Dio transformis lian honton kaj konfuzon kaj daŭre konfidas al Dia firma amo.

La aŭtoro de la Letero al Hebreoj rememorigas la paciencon de homoj kiel Abraham (6,15) kaj aliaj, kiuj kapablis venki per sia fido kaj konfido en Dio. Konscio, ke Dio intervenas kaj eniras en la historion de la homaro forigas la tenton esti triumfanta laŭ la homa vidpunkto.

En la evangelio la voĉo el ĉielo ĉe la bapto de Jesuo anoncanta "Jen estas mia Filo, la Amata" ŝajnas esti garantio de la sukceso de lia mesia misio. Jesuo rezistis la malbonon kaj ne subiĝis al la tento enkonduki la Dian Regnon tuj, sed li pacience revelacias, kion signifas la vivo en la regno. Li revelacias tion per sia propra vivo kaj servo, kiu kondukas al lia morto sur la kruco. Kvankam Dia regno decide venas ĉe la releviĝo, ĝi ankoraŭ ne plene realiĝis. La lasta venko venos nur per la dua alveno de nia Sinjoro. Do ni atendas en pacienca espero kaj konfido kun la alvoko "Venu, Sinjoro Jesuo".

Nia sopiro pri la videbla unueco de la Eklezio simile postulas paciencan kaj konfideman atendadon. Nia preĝo por kristana unueco estas kiel preĝo de Ĥana kaj la psalmisto. Nia laboro por kristana unueco estas kiel agoj menciitaj en la Letero al Hebreoj. Nia alpaŝo de pacienca atendado ne estas alpaŝo de senhelpeco aŭ pasiveco, sed profunda konfido, ke unueco de la Eklezio estas Dia donaco kaj ne nia atingaĵo. Ĉi tiu pacienca atendado, preĝado kaj konfido transformas nin kaj pretigas nin por la videbla unueco de la Eklezio ne kiel ni planas ĝin, sed kiel Dio donacas ĝin.

## Preĝo

Fidela Dio, vi estas fidela al via vorto en ĉiu aĝo. Donu, ke ni, kiel Jesuo, havu paciencon kaj konfidon en via firma amo. Prilumu nin per via Sankta Spirito, por ke ni ne malhelpu la plenecon de via justeco per niaj hastaj prijuĝoj, sed prefere ni ekkonu vian saĝecon kaj amon en ĉio, vi, kiu vivas kaj regas eterne. Amen.

## Demandoj por la persona meditado

1. En kiaj situacioj de nia vivo ni devus havi pli grandan konfidon al Diaj promesoj?
2. Kiuj areoj de eklezia vivo estas endanĝerigitaj per la tento agi tro haste?
3. En kiuj situacioj kristanoj devus atendi kaj kiam ili devus agi kune?



## LA SESA TAGO:

**Ŝanĝitaj de la Eterna Boneco de Dio**
**Jen estas la venko, nia fido (kp. 1 Joh 5,4)**

## Legaĵoj

*Ĥabakuk 3, 17-19 La Eternulo, la Sinjoro, estas mia forto*

Kiam la figarbo ne floros,
la vinberbranĉoj ne donos fruktojn,
la olivarbo rifuzos sian laboron,
la plugokampoj ne donos manĝaĵon,
la ŝafoj estos forkaptitaj el la ŝafejo,
kaj en la staloj ne troviĝos bovoj:
eĉ tiam mi ĝojos pri la Sinjoro,
mi estos gaja pri la Dio de mia savo.
Dio, la Sinjoro, estas mia forto;
li faras miajn piedojn kiel ĉe cervo,
kaj venigas min sur miajn altaĵojn.

*Psalmo 136(135), 1-4.23-26 Eterna estas Lia boneco*
Gloru la Sinjoron, ĉar li estas bona,
ĉar eterna estas lia boneco.
Gloru la Dion de la dioj,
ĉar eterna estas lia boneco.
Gloru la Sinjoron de la sinjoroj,
ĉar eterna estas lia boneco.
La sola faranto de grandaj mirakloj,
ĉar eterna estas lia boneco;
Kiu rememoris nin, kiam ni estis humiligitaj,
ĉar eterna estas lia boneco;
kaj liberigis nin de niaj premantoj,
ĉar eterna estas lia boneco;
kiu donas panon al ĉiu karno,
ĉar eterna estas lia boneco.

La legaĵo el la letero al Efesanoj reprenas la profetadon de Malaĥi. Malkonstruis Jesuo la malamikan muron inter la homoj kaj li fondis novmanieran konkordon. Propradire venko de homo signifas malvenko kaj malglora hontego de alia ulo. La venkito cedu. Sed Jesuo nek forpelas nek ruinigas aŭ malaltigas iun. Kontraŭe li transformas, sanigas, unuigas ĉiujn, invitante ilin esti la samdomanoj de Dio.

Paco al vi – tiel salutas la releviĝinta Kristo siajn disĉiplojn konfuzitajn kaj malcertigitajn. Tiu ĉi saluto estas samtempe Krista donaco: Li donacis la pacon. Sekve ni rajtas travivi ĉiujn rilatojn, ankaŭ la rilaton kun la kreado, en la paco de Dio. Venigitaj kaj vokitaj ni estas ĉiuj al la misio kristana en la forto de la Sankta Spirito: antaŭ la tuta mondo depozicie atesti la pacon kaj la pardonon de Dio pro sanigaj kialoj. Per la disiĝoj inter la kristanoj la Evangelio suferas damaĝon kaj iĝas ete nekredinda. Tial la eklezioj permesu al si tute novan donacon de unuiĝo per la paco de Dio.

**Preĝo**

Ho, Dio amanta kaj gracodonanta, donu al ni la ĝojon pri via paco. Plenigu nin per via Sankta Spirito, por ke ni sukcesu faligi la murojn disigantajn. Kristo releviĝinta, kiu estas nia paco, helpu al ni venki ĉiujn separadojn kaj unuiĝi kiel viaj samdomanoj. Tiel ni preĝas al Vi, kiu Vi vivas kaj regas eterne. Amen.

**Demandoj por persona meditado**

1. Kiuj specoj de fortigo estas en nia komunumo kaj kiel ni sukcesas konfronti nin al ili?
2. Kie ekzistas malkaŝa malamo malhelpanta la interkomunumanajn rilatojn?
3. Kiel ni povas ellerni la akcepton de ni mem laŭ la maniero de nia akceptiĝo ĉe Kristo?



**TRIA TAGO:**

**Ŝanĝitaj de la suferanta Servanto**
**"Kristo mortis por vi " (*1 Pet* 2, 21)**

*Iesaja 53,3-11* *Viro suferanta kaj malsana*

Li estis malestimata kaj evitata de homoj,
viro suferanta kaj malsana;
kaj kiel iganta deturni de li la vizaĝon,
li estis malestimata,
kaj li havis por ni nenian valoron.
Vere, niajn malsanojn li portis sur si,
kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis;
sed ni opiniis lin plagita,
frapita de Dio, kaj humiligita.
Tamen li estis vundita
pro niaj pekoj,
dispremita pro niaj krimoj;
puno por nia bono estis sur li,
kaj per lia vundo ni saniĝis.
Ni ĉiuj erarvagis kiel ŝafoj,
ĉiu iris sian vojon;
kaj la Sinjoro ĵetis sur lin
la kulpon de ni ĉiuj.
Li estis turmentata,
tamen li humiliĝis kaj ne malfermis sian buŝon;
kiel ŝafido kondukata al buĉo
kaj kiel ŝafo muta antaŭ siaj tondantoj,
li ne malfermis sian buŝon.
De malliberigo kaj de juĝo
li estas prenita;
kaj pri lia generacio kiu rakontos?
De sur la tero de vivantoj
li estas fortranĉita,
pro la kulpo de mia popolo li estas frapita.
Inter malbonaguloj oni donis al li tombon,

inter riĉuloj post lia morto,
kvankam li ne faris maljustaĵon
kaj trompo ne estis en lia buŝo.
Sed la Sinjoro
volis tiel lin turmenti.
Kiam lia animo estos preninta sur sin
elaĉetan punon,
li vidos idaron, li longe vivos,
kaj la intenco de la Sinjoro sukcesos per lia mano.
La Sinjoro deklaras:
«La laborfrukton de sia animo
li vidos,
kaj satiĝos.
Per konigo de li
Mia virtulo-servanto
virtigos multajn;
kaj iliajn pekojn li portos sur si.»

*Psa 22 (21), 12-25 La Sinjoro ne kaŝis antaŭ mi sian vizaĝon sed aŭskultis min, kiam mi kriis al li.*

Ne malproksimiĝu de mi,
ĉar malfeliĉo estas proksima, kaj helpanton mi ne havas.
Ĉirkaŭis min multaj bovoj,
fortaj bovoj Baŝanaj stariĝis ĉirkaŭ mi.
Ili malfermegis kontraŭ mi siajn buŝojn,
kiel leono ŝiranta kaj krieganta.
Kiel akvo mi disverŝiĝis,
kaj disiĝis ĉiuj miaj ostoj;
mia koro fariĝis kiel vakso, fandiĝis en mia interno.
Mia forto elsekiĝis kiel peco da poto;
mia lango algluiĝis al mia palato;
kaj vi metas min en tomban polvon.
Ĉar ĉirkaŭis min hundoj;
amaso da malbonuloj staras ĉirkaŭ mi;
ili mordas miajn manojn kaj piedojn.
Mi povas kalkuli ĉiujn miajn ostojn;
ili rigardas kaj konstante rigardas.



Ĉar nia paco estas Kristo, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, en sia karno neniiginte la malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon; kaj por kunakordigi ambaŭ en unu korpo al Dio per la kruco, mortiginte per tio la malamon; kaj li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al la proksimaj; ĉar per li ni ambaŭ havas en unu Spirito alkondukon al la Patro. Sekve vi jam estas ne fremduloj kaj pasloĝantoj, sed samregnanoj kun la sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio, konstruitaj sur la fundamento de la apostoloj kaj profetoj, kies bazangula ŝtono estas Kristo Jesuo mem.

*Johano 20, 19-23 Jesuo staris meze de ili kaj diris al ili: Paco al vi.*

Kiam do estis vespero en tiu sama tago, la unua de la semajno, kaj kiam estis fermitaj la pordoj, kie la disĉiploj estis, pro timo antaŭ la Judoj, Jesuo venis kaj staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi. Kaj dirinte tion, li montris al ili siajn manojn kaj sian flankon. La disĉiploj do ĝojis, vidante la Sinjoron. Jesuo denove diris al ili: Paco al vi; kiel la Patro sendis min, tiel ankaŭ mi vin sendas. Kaj dirinte tion, li elspiris sur ilin, kaj diris: Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenos, ili estas retenitaj.

**Komento**

La lastaj vortoj de la lasta libro de la Malnova Testamento anoncis la sendon de la elektito de Dio por alporti pacon en ĉiujn domojn. En la konekso de malpaco ni normale pensas pri la rilato inter popoloj kaj nacioj. Sed la profeto Malaĥi memorigas al ni unu el la plej malnovaj kaj gravaj konfliktoj – nome la ĉagrenon en la rilato inter gepatroj kaj iliaj infanoj. Dio volas sanigi la rilatojn inter gepatroj kaj iliaj infanoj. La sendito fare de Li scipovas fari la miraklon transformi la korojn kaj tiel la interrilatojn homajn.

En la psalmo aŭdiĝas la ĝojo pri la konkordo homara. Ĉar ne estis kreita la homo por esti sola. Krome li ne sukcesas vivi ĉiam en malamika atmosfero. Ne ekzistas feliĉo sen homa komunumo, sen harmonio, paco, konfido, akordo. Rilatoj prosperaj inter la homoj egalas la roson antaŭ tagiĝo sur seka tero kaj agrablan ŝmiradon per oleo. Tia harmonio okazas kie la homoj fidas en la paco de Dio.

**LA KVINA TAGO:**

**Ŝanĝitaj per la paco de la Sinjoro releviĝinta**
**Jesuo staris meze de ili kaj diris al ili: Paco al vi. (Joh 20,19)**

**Legaĵoj**

*Malaĥi 3, 23-24 Kaj Li returnos la koron de la patroj al la infanoj, kaj la koron de la infanoj al iliaj patroj*

Diras la Sinjoro: Jen mi sendos al vi la profeton Elija, antaŭ ol venos la granda kaj timinda tago de la Sinjoro; kaj li returnos la koron de la patroj al la infanoj, kaj la koron de la infanoj al iliaj patroj, por ke mi, veninte, ne frapu la teron per anatemo.

*Psalmo 133(132), 1-4 Jen, kiel bone kaj ĉarme estas, se fratoj vivas kune!*

*Kanto de suprenirado. De David.*

Jen, kiel bone kaj ĉarme estas,
se fratoj vivas kune!
Kiel la bona oleo,
kiu de la kapo defluas sur la barbon,
la barbon de Aaron,
kaj defluas sur la randon de lia vesto;
kiel la roso,
kiu de Ĥermon malleviĝas sur la montojn de Cion;
ĉar tie la Sinjoro donas la benon,
vivon por eterne.

*Efesanoj 2, 14-20 Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, en sia karno neniiginte la malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon.*



Ili dividas miajn vestojn inter si, pri mia tuniko ili lotas.
Sed Vi, ho Sinjoro, ne malproksimiĝu;
mia forto, rapidu, por helpi min.
Savu de la glavo mian animon,
mian solan savu de la hundo.
Savu min de buŝo de leono,
kaj helpu min kontraŭ kornoj de bubaloj.
Sinjoro, vi aŭskultis min.
Mi predikos vian nomon al miaj fratoj;
en la mezo de popola kunveno mi vin gloros.
Respektantoj de la Sinjoro, gloru lin;
tuta semo de Jakob, honoru lin;
tuta semo de Izrael, estimegu lin.
Ĉar li ne malŝatis
kaj ne malestimis la suferojn de premato,
kaj ne kaŝis antaŭ li sian vizaĝon;
sed aŭskultis lin, kiam tiu kriis al Li.

*1 Pet 2,21-25 Kristo mortis por vi*

Al ĉi tio vi estas vokitaj; pro tio, ke Kristo ankaŭ suferis pro vi,
postlasante por vi ekzemplon, por ke vi sekvu liajn postesignojn.
Pekon li ne faris,
kaj trompo ne troviĝis en lia buŝo;
insultate, li ne insultis responde;
suferante, li ne minacis,
sed submetis sin al la juste juĝanta;
li mem portis niajn pekojn en sia korpo
sur la lignaĵo,
por ke ni, malvivigite koncerne pekojn,
vivu por justeco;
per lia vundo vi resaniĝis.
Ĉar vi estis kiel ŝafoj erarvagantaj;
sed nun vi returne venis al la paŝtisto
kaj episkopo de viaj animoj.

*Luk 24,25-27* *Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion?*

Tiam Jesuo diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem.

**Komento**

La dia paradokso estas tia: Dio povas transformi tragedion kaj ruiniĝon en venkon. Li transformas ĉiujn niajn suferojn kaj malfeliĉojn kaj la grandegan doloron de la historio en releviĝo, kiu ĉirkaŭbrakas la tutan mondon. Aspektante venkita, Li male estas la vera venko, kiun neniu kaj nenio povas supervenki.

La kortuŝa profetaĵo de Jesaja pri la suferanta Servanto de la Sinjoro plene realiĝis en Kristo. Suferinte korŝiran agonion, la Homo de la doloroj "havos idaron" (*Jes* 53, 10). Estas ni tiu idaro naskiĝinta el la suferoj de la Savanto. Tiel ni fariĝis en li ununura familio. Oni povas aserti, ke la *Psalmo 22* ne estas nur pri Jesuo, sed ankaŭ por Jesuo. La Savanto mem surkruce preĝis ĉi tiun psalmon, kiam Li eldiris la senkonsolajn komencajn vortojn. "Mia Dio, mia Dio, kial vi forlasis min?" (*Psa* 22,2). Tamen en la dua parto de la psalmo la ĝemo, la alvoko, plena je doloro, fariĝas laŭdo al Dio pri iliaj faroj.

Apostolo Petro estas "atestanto de la sufero de Kristo" (*1 Pet* 5, 1), kaj ĝin prezentas al ni kiel ekzemplon: estas al ĉi tiu sufero por amo, ke ni estas alvokataj. Jesuo ne malbenis Dion, sed sin submetis al tiu, kiu ĉion juĝas kun justeco. Lian vundojn sanigis nin kaj rekondukis nin al la ununura Ŝafisto. Nur ĉe la lumo de la ĉeesto de la Sinjoro kaj de lia vorto malkovriĝas la dia plano pri la suferoj de la Mesio. Ĝuste kiel por la disĉiploj survoje al Emmaus, Jesuo estas nia kunvojaĝanto sur la vojo de la vivo, kiu flamigas la korojn kaj malfermas al ni la okulojn sur la mistera plano de la savo.

La kristanoj spertas la suferon kiel rezulton de la malfortika homa kondiĉo; ni rekonas ĉi tiun suferon en la sociaj maljustaĵoj, en la persekutaj situacioj. La povo de la kruco kondukas nin al la unueco, el la sufero de Kristo fontas kompato kaj solidareco al la tuta homa familio.



**Preĝo**

Sinjoro Jesuo Kristo, ni dankas vin pro via venko kontraŭ la malbono kaj kontraŭ la disiĝo. Ni dankas vin pro via ofero kaj pro via releviĝo, kiu konkeras la morton. Helpu nin en nia ĉiutaga batalo kontraŭ ĉia kontraŭaĵo. Faru tiel, ke la Sankta Spirito donu al ni la forton kaj la saĝon por ke, sekvante vin, ni povu venki la malbonon per la bono, kaj la disiĝon per la repaciĝo. Amen.

**Demandoj por la persona meditado**

1. Kie ni ekrimarkas la malbonon en nia vivo?
2. Kiamaniere nia fido en Kristo povas helpi nin venki la malbonon kaj la Tentanton?
3. Kion ni povas lerni de situacioj, en niaj komunumoj, en kiuj la disiĝo lasas lokon al la repaciĝo?

ĵon de Dio. En Jesuo ni povas kundividi novan vivon, kiu alvokas nin batali kontraŭ ĉian malĝuston en la mondo, kun renovigita fido kaj kun ĝojo en la bono.

La vortoj de la Malnova Testamento nepre avertas kontraŭ la agado malĝusta kaj maljusta. La sinteno de la plimulto nepre ne povas esti preteksto por rajtigi la malbonagojn, nek tion povas la riĉaĵoj aŭ la aliaj cirkonstancoj de la vivo.

La *Psalmo 1* atentigas ne nur pri la neceso observi la ordonojn, sed pleje pri la ĝojo kiun tio estigas. Kiu amas la leĝon de la Sinjoro antaŭ ĉio, tiu estas nomata feliĉa kaj beata. La dia vorto estas sekura gvido en la malprosperoj; primediti la dian vorton "nokte kaj tage" (*Psa* 1, 2) atingigas al ni la homan saĝecon kaj kapabligas nin al vivo fruktodona por ĉies bono.

En la admono de la apostolo ni trovas kuraĝigon al "venko de la malbono per la bono" (kp. *Rom* 12, 21). Nur la bono povas interrompi la spiralojn de malamo kaj de la homa venĝemo. En la batalo por la bono, ne ĉio dependas de la homo. Tamen la apostolo Paŭlo admonas plene zorgi por pluteni la pacon kun la aliaj. Li komprenas, ke ni vivas en daŭra batalo kontraŭ la instinkto damaĝi tiun, kiu nin vundas, sed li instigas nin ne lasi nin venki de tiuj detruantaj emoj. Bonfari estas efika maniero por kontraŭbatali la malbonon inter ni.

La evangelia rakonto priskribas la batalon de la Filo de Dio kontraŭ Satano, personigo de la malbono. La venko de Jesuo kontraŭ la tentoj en la dezerto realiĝas en lia obeo al la Patro, obeo, kiu kondukos lin al la kruco. La releviĝo de la Savanto konfirmas, ke la dia boneco venkas: la amo supervenkas la morton. La releviĝinta Sinjoro estas proksima! Li akompanas nin en ĉiu batalo kontraŭ la tento kaj la peko en la mondo. Lia ĉeesto vokas la kristanoj agi kune en la idealo de la bono.

La skandalo estas tio, ke pro niaj disiĝoj, ni ne kapablas batali sufiĉe energie kontraŭ la nuntempa malbono. Unuiĝintaj en Kristo, en la ĝojo de lia leĝo de amo, ni estas vokataj kundividi lian mision alporti la esperon, kie estas maljusteco, malamo kaj senespero.



Kiel asertas nuntempa teologo: "Des pli ni alproksimiĝas al la kruco de Kristo, des pli ni alproksimiĝas unuj al la aliaj". La atesto de la kristanoj kunigitaj en suferigaj situacioj alprenas grandan kredeblecon. Pere de nia solidareco kun ĉiuj suferantoj, ni lernas de la krucumita suferanta Servisto la lecionon pri la sin-malplenigo, pri la forlasiĝo kaj la sinofero. Ĉi tiuj estas la donacoj donitaj de lia Spirito, ili estas tio, kiun ni bezonas sur la vojo al la unuiĝo en li.

**Preĝo**

Ho Dio de konsolo, vi transformis la honton de la kruco en signon de venko. Faru ke ni estu unuigitaj ĉirkaŭ la kruco de via Filo por adori lin pro la mizerikordo oferdonata pere de lia sinofero. Povu la Sankta Spirito malfermi niajn okulojn kaj niajn korojn, por ke ni povu helpi la suferantojn percepti vian apudecon. Vi kiu vivas kaj regnas en la jarcentoj. Amen

**Demandoj por la persona meditado**

1. Kiamaniere la fido povas helpi nin respondi al la longedaŭraj suferoj?
2. Kiaj formoj de la homa sufero estas nun neglektitaj aŭ subtaksataj?
3. Kiamaniere povas la kristanoj kune atesti la povon de la kruco?

**KVARA TAGO:**

**Ŝanĝitaj de la venko de la Sinjoro kontraŭ la malbono**
**"Venku malbonon per bono" (*Rom* 12, 21)**

*Eli 23, 1-9 Ne partianiĝu kun la plimulto, kiam ĝi agas malbone.*

Diras la Sinjoro: «Ne disvastigu malveran famon; ne kunigu vian manon kun malvirtulo, por esti atestanto de malbonago. Ne sekvu la amason por malbonaĵoj; kaj en juĝo ne kliniĝu al la opinio de la plimulto, por dekliniĝi de la vero. Ankaŭ malriĉulon ne favoru en lia juĝa afero. Se vi renkontos bovon de via malamiko aŭ lian azenon erarvagantan, rekonduku ĝin al li. Se vi vidos, ke azeno de via malamiko falis sub sia ŝarĝo, ne forlasu ĝin, sed alportu helpon kune kun li. Ne forklinu la rajton de via malriĉulo en lia juĝa afero. De mensogaĵo malproksimiĝu, kaj senkulpulon kaj virtulon ne mortigu; ĉar mi ne pravigos maljustulon. Donacojn ne akceptu; ĉar donacoj blindigas vidantojn kaj malĝustigas la aferojn de virtuloj. Fremdulon ne premu; vi konas ja la animon de fremdulo, ĉar fremduloj vi estis en la lando Egipta».

*Psa 1, 1-6 Feliĉa estas la justulo: [...] lia ĝojo estas la vorto de la Sinjoro*

Feliĉa estas la homo,
kiu ne iras laŭ konsilo de malpiuloj, nek staras sur vojo de pekuloj,
nek sidas en kunsido de blasfemantoj;
sed li nur havas deziron por la leĝo de la Sinjoro,
kaj pri lia leĝo li pensas tage kaj nokte.
Kaj li estos kiel arbo, plantita apud akvaj torentoj,
donanta sian frukton en sia tempo,
kaj kies folio ne velkas;
kaj en ĉio, kion li faras, li sukcesos.
Ne tiel estas la malpiuloj;
sed ili estas kiel grenventumaĵo, kiun disblovas la vento.
Tial ne staros fortike la malpiuloj ĉe la juĝo,
nek la pekuloj en societo de piuloj.



Ĉar la Sinjoro konas la vojon de piuloj;
sed la vojo de malpiuloj pereos.

*Rom 12,17-21 Venku malbonon per bono*

Redonu al neniu malbonon pro malbono. Celu aprobindaĵojn antaŭ ĉiuj homoj. Se estos eble, restu pacaj viaparte kun ĉiuj homoj. Ne venĝu vin, amataj, sed cedu lokon al la dia kolero; ĉar estas skribite: Ĉe mi estas venĝo, mi repagos, diras la Sinjoro. Sed se via malamiko malsatas, donu al li manĝi; se li soifas, donu al li trinki; ĉar tion farante, fajrajn karbojn vi kolektos sur lia kapo. Ne venkiĝu de malbono, sed venku malbonon per bono.

*Mat 4,1-11 Al la Sinjoro, via Dio, vi adorkliniĝu, kaj al li sola vi servu*

Tiam Jesuo estis kondukita supren de la Spirito en la dezerton, por esti tentata de la diablo. Kaj fastinte kvardek tagojn kaj kvardek noktojn, li poste malsatis. Kaj la tentanto venis, kaj diris al li: Se vi estas Filo de Dio, ordonu, ke tiuj ŝtonoj fariĝu panoj. Sed responde li diris: Estas skribite: Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto, kiu eliras el la buŝo de Dio. Poste la diablo portis lin en la sanktan urbon, kaj starigis lin sur la tegmenta pinto de la templo, kaj diris al li: Se vi estas Filo de Dio, ĵetu vin malsupren, ĉar estas skribite: Al siaj anĝeloj li ordonos pri vi, kaj sur la manoj ili vin portos, por ke vi ne falpuŝiĝu sur ŝtono per via piedo. Jesuo diris al li: Ankaŭ estas skribite: Ne provu la Sinjoron, vian Dion. Denove la diablo portis lin al monto tre alta, kaj montris al li ĉiujn regnojn de la mondo kaj ilian gloron, kaj diris al li: Ĉion tion mi donos al vi, se vi faligos vin kaj adorkliniĝos al mi. Tiam Jesuo diris al li: Foriru, Satano! ĉar estas skribite: Al la Sinjoro, via Dio, vi adorkliniĝu, kaj al li sola vi servu. Tiam la diablo forlasis lin, kaj jen anĝeloj venis kaj servadis al li.

**Komento**

En Jesuo ni lernas, kion signifas efektive la vorto "venko" por la homaj estuloj: reciproka feliĉigo en la amo de Dio, pere de lia venko kontraŭ tio, kio nin disigas. Temas pri kundivido de la venko de Kristo kontraŭ la detruaj fortoj, kiuj damaĝas la homaron kaj la tutan kreita-